



Malliberigo en Ĉinio

Perforto kaj fraŭdado en niĝeriaj balotoj

Cenzuro por germanoj

# Ombroj super libereco

# Stefan Maul

## El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

FOTO DE LA KOVRILLO: CHRIS PIRILLO

## Kaj Pilato lavis siajn manojn...

7

La 20an de aprilo 2004 la ĉina registaro insiste petis ĉiujn ĵurnalistojn nenion raportis pri la tiel nomataj „eventoj de la 4a de junio”, t.e. la protestoj en placo Tiananmen. La ĵurnalista SHĪ Tāo nenion raportis, sed hejme, per sia privata retadreso de *Yahoo!*, li sendis resumon de la dokumento al la transmara retejo Asia Democracy Foundation (Fondaĵo por demokratio en Azio), kiu publikigis ĝin en siaj paĝoj. SHĪ Tāo estis enkarcerigita pro informoj de *Yahoo!*.



## Diantoj ... kaj domoj

8

Post 48 jaroj da diktatoreco la portugala popolo finis la faŝisman reĝimon la 25an de aprilo 1974 per sensanga revolucio. Portugaloj nomas ĝin la „Dianta Revolucio”. 33 jaroj poste, portugaloj vidas iom post iom, kiel estas detruataj libereco kaj demokratio.



## Elektoj sen elektiloj

10

Dum la elekto-tago niĝerianoj iris por voĉdoni, sed trovis mankon de elektiloj, sekurec-agentojn por fortimigi opozicianojn, perforton kaj mortigon. Fine de la elektado eĉ tie, kie ne okazis voĉdonado, oni anoncis rezultojn kaj deklaris PDP-on venka.



## „Flickr” malbone flikas

11

La 13an de junio la germanlingvaj vizitantoj de Flickr subite rimarkis, ke multaj bildoj, kiujn ili en la antaŭaj tagoj povis vidi, nun subite ne plu estas alireblaj. Anstataŭ la foto venis mesaĝo: „Tiu ĉi foto ne estas disponebla al vi”. Germanaj juristoj diskutis, sed ne trovis precizajn leĝojn.



### POLITIKO

Portugaloj ..... 8  
Diantoj ... kaj domoj

Albanio ..... 9  
Historia vizito

Niĝerio ..... 10  
Elektoj sen elektiloj

### MODERNA VIVO

Cenzuro ..... 11  
„Flickr” malbone flikas

Ĉinio ..... 12  
Nova mono por malnovaj domoj

Sano ..... 13  
Planoj senmaskigitaj

Albanio ..... 14  
Abiturienta ov-acio

Samseksemo ..... 14  
Nek publikaj, nek sekuraj

Japanio ..... 15  
Legantoj mem decidu

### SPIRITA VIVO

Pollando ..... 16  
Ni renkontiĝu ĉe la monumento al Korczak

### EKONOMIO

Ĉinio ..... 18  
Tri milionoj da aŭtoj en Pekino

### LINGVO

Lingva diverseco ..... 20

### TURISMO

Bulgario ..... 22  
Festo de ĝemeloj

### ARTO

Literaturo ..... 23  
Insulo de verkistoj

Irlando ..... 26  
Ornamitaj manuskriptoj

### HOBIO

Finnlando ..... 28  
Kultivi bonsajon

### NOVELO

Kiso sur la ventro ..... 29

### LIBROJ

Modernantikvaj fabeloj ..... 30

La mondo laŭ la vidpunkto de leopardo ..... 31

### ENIGMO

Giganta sudoko ..... 33

Solvo al la novembra enigmo 3 en 1 ..... 34

Abonaj ..... 4

Enkonduko ..... 5

Leteroj ..... 6

El mia vidpunkto ..... 7

Anoncetoj ..... 35

# Kiel pagi vian abonon de MONATO?

## ► Rekte al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## ► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO		La Jaro aere	
		surface	aere	1 fojon monate	tuj
Argentino	EUR	23	26	5	9
Aŭstralio	AUD	82	90	9	17
Aŭstrio	EUR	46	50	5	9
Belgio	EUR	46	56	5	9
Brazilo	EUR	23	26	5	9
Britio	GBP	32	35	4	6,5
Bulgario	EUR	23	26	5	9
Ĉeĥio	EUR	30	34	5	9
Danio	DKK	345	375	40	70
Estonio	EUR	23	26	5	9
Finnlando	EUR	46	50	5	9
Francio	EUR	46	50	5	9
Germanio	EUR	46	50	5	9
Germanio orienta	EUR	41	45	5	9
Grekio	EUR	41	45	5	9
Hispanio	EUR	41	45	5	9
Honkongo	EUR	41	45	5	9
Hungario	EUR	23	26	5	9
Irlando	EUR	46	50	5	9
Islando	EUR	46	50	5	9
Israelo	EUR	41	45	5	9
Italio	EUR	46	50	5	9
Japanio	JPY	6900	7300	860	1260
Kanado	CAD	73	78	9	15
Kipro	EUR	30	34	5	9
Koreio	EUR	41	45	5	9
Kroatio	EUR	23	26	5	9
Latvio	EUR	23	26	5	9
Litovio	EUR	23	26	5	9
Luksemburgo	EUR	46	50	5	9
Malto	EUR	30	34	5	9
Nederlando	EUR	46	50	5	9
Norvegio	NOK	390	430	45	71
Nov-Zelando	NZD	93	99	9	18
Pollando	PLZ	99	110	22	36
Portugaliao	EUR	37	41	5	9
Rusio	EUR	23	26	5	9
Singapuro	EUR	41	45	5	10
Slovakio	EUR	23	26	5	9
Slovenio	EUR	30	34	5	9
Sud-Afriko	EUR	41	46	5	10
Svedio	SEK	430	465	49	84
Svislando	CHF	74	81	9	14
Tajvano	EUR	41	45	5	9
Usono	USD	61	65	8	13
Baza tarifo	EUR	46	50	5	9

Prezo de la retaj versioj (askia, unikoda aŭ PDF): 60% de la surfaca tarifo.

## ► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazilia:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** David Kelso, 5 Craigenhill Road, Kincadzow, CARLUKE ML8 4QT, Tel 01555 759 166. Reto: davekelso@yahoo.co.uk
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnicky@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estonia:** Virve Ermits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveermits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafofficejo@esperanto.fi
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
  - Hilde Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg (banko: LIGA Augsburg 113514, BLZ 750 903 00). Reto: s.h.maul@t-online.de.
  - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schweringen (Volksbank Graftschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: RoBo. ESPERO@t-online.de.
  - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
  - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanner@tiscalinet.de
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakats u. 1/3 III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Wa-

- sedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. esperanto@jei.or.jp.
- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159, Sydney, B.C., V8L 3S6. Reto: iwolemskatl@shaw.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.1817, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper\_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
  - Halina R. Gorceka, RUS-236039 Kalingrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
  - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.81 0.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
  - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- **Svedaj:**
  - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.g. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
  - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
  - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch\_scheidegger@bluewin.ch.
  - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Faks: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org





# Ret-malsano

En marto 1994 la eldonejo de MONATO serĉis novan redaktoron por la rubriko *Kuirado* post la demisio de Marco Gazzetta. Unuafoje tiu serĉado okazis rete, kaj inter la kondiĉoj por iĝi redaktoro estis eĉ aliro al la reto. La retadreso de la eldonejo en tiu anonco estis *paul@knooppt.hacktic.nl*. Ĉu do en tiu tempo la eldonejo estis en Nederlando? Ne, ĝi ĉiam estis en Antverpeno, sed en tiu tempo ankoraŭ ne ekzistis publikaj retperantoj en Belgio, kaj FEL do devis – se ĝi volis havi retadreson – akiri tiun ĉe eksterlanda peranto, nome *Hacktic*.

*Hacktic* estis la unua peranto en Nederlando, kiu malfermis Interreton por la publiko. En tiu „heroa” tempo aliri la reton ne estis tiel facile kiel nun, sed, se oni finfine sukcesis, oni ja estis certa pri la rezulto. Se fine de la pasinta jarcento oni sendis retleteron, oni certis pri ĝia alveno. Kaj se fojfoje tamen io misiris, oni ricevis leteron, kiu koncize klarigis, kial la mesaĝo ne povis esti liverita.

Nun tamen, nur iom pli ol dek jarojn poste, la situacio estas tute alia. Se oni sendas retleteron, oni povas nur esperi je ĝia alveno. Certi ne plu eblas. Tiun situacion ni ŝuldas al la sinjoroj kaj sinjorinoj spamistoj. Ĉar pli ol 90 % de la retmesaĝoj estas spamo, do nepetita kaj altrudita reklamo, retperantoj provas per diversaj filtrsistemoj eviti la plenŝtopiĝon de siaj lineoj. Iuj el tiuj filtriloj estas tre efikaj, sed aliaj estas primokindaj. Antaŭ nelonge iu grandega belga retperanto konfesis, ke ĝi filtris spamon laŭ la lingvo. Esperanto estis por la filtrilo nekonata lingvo, kaj do ĉiuj Esperanto-leteroj enrubujigis.

Kion konkludi? Se al letero sendita al MONATO, aŭ al iu ajn, vi ne ricevos respondon ene de normala tempoperiodo, indas suspekti, ke via letero estis barita de iu misagordita spamfiltrilo. Ne hezitu peti konfirmon per dua retletero kaj, se ankaŭ al tiu ne sekvas respondo, per praaj pasintjarcentaj metodoj, kiel telefono aŭ eĉ papera letero!

Esperante, ke tiu ĉi numero de MONATO atingos vin, sincere salutas

Paul PEERAERTS

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 28a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-raĵto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

### eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retroŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncartarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

### ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

### reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

### redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

### grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

### redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.
- **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.
- **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net. **Nota:** Libreccenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.
- **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net..
- **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: moderna\_vivo@monato.net.
- **Noveloj kaj Poezio:** Geraldo Mattos, Rua Rio Jutai 320, 82840-420 Curitiba PR, Brazilo. Rete: noveloj@monato.net.
- **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.
- **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14<sup>th</sup> St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.
- **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita\_vivo@monato.net
- **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/ja 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.
- **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco\_kaj\_satiro@monato.net.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslandspresse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

## La tri turoj de MKC (4)

En la artikolo de Ian Fantom *Kial vere kolapsis la tri turoj de MKC?* (MONATO 2007/4, p. 24-26) mi trovis teknikajn hipotezojn por klarigi la disfalon de la turoj. Thomas Eccardt (MONATO 2007/6, p. 6) kontraŭas per tio, kio aperas en *wtc.nist.gov*. En la citita retpaĝo mi ne sukcesis trovi teknikajn hipotezojn samcelajn. Ĉu s-ro Eccardt bonvolus montri ilin al mi? Mi estas inĝeniero kun pli ol tridek jaroj da sperto pri ŝtalo kaj ĝiaj kvalitoj.

Ramon PERERA  
Katalunio



## Spiriteco unua- kaj duagrada

Se facilas rekonii en humanistoj tion, per kio W. H. Simcock ilin ekipas (MONATO 2007/6, p. 18), nome emocikapablom

ktp, kvazaŭ komencgradan spiritecon, malpli facilas kompreni, kial Simcock obstinas envicigi en la humanistan liston nur al la homaro bonfarajn klerigistojn, kondiĉe ke ili estu nedikredantaj. Ĉu tio ne kontraŭas historion kaj konstantan konstaton? Se forlasi milojn da nomoj, ĉu ne indus ensteliĝi en la noblan liston Tolkien, Lewis, Milton, Newton?

Feliĉe Simcock asertas: „Spiriteco estas laŭokaza sperto. Ĝi ne povas esti bazo por konstrui kredosistemon.” Konsentebla same kiel la simila „spirita ne signifas religia”, malgraŭ ke (grumblus kelkaj) humanistoj trovis en tia spiriteco puŝan inviton por enketi, laŭ malsamaj vojoj certe, pri nesensebla, neemocia kaj nemateria estulo, tute eksteremocia ...

Feliĉaj konceptoj, ĉar plikleriĝintaj humanistoj ĉi-punkten alvenas (mi konsideras precipe kristanismo) post ampleksa uzo de la racio: oni komencas kaj procedas per la racio ĝia, kiam ĝi informas, ke iu respondas kaj kunigas al la racio mem.

Armando ZECCHIN  
Italio

## Amika pafado

La furioza pafado kontraŭ la gejoj fare de la katolika eklezio estas rimarkinda ekzemplo de amika pafado.

Filippo FRANCESCHI  
Italio

## Rajto pri rebato

En MONATO 2007/4, p. 23, aperis la artikolo *Gvatu la turon!* de Ferriol Macip i Bonet pri la Jehovo-atestantoj.

Studo de la instituto *SOFRES* rimarkigis, ke la medicina ĝenerala kontrolo de la Jehovo-atestantoj estas identa al tiu de iliaj samlandanoj kaj do ne montras apartecon. Pri la malakcepto de sangotransverŝado la franca leĝo nepre antaŭkalkulas, ke ĉiuj kuracatoj povas elekti siajn medicinajn kuracadojn. La plej alta administra jurisdikcio en Francio, la Ŝtatkonsilo, cetere juĝis, ke la rajto de la kuracataj Jehovo-atestantoj malakcepti tiun ĉi terapion, apartenas al ilia fundamenta libereco.

Iuj aŭtoroj cetere ne hezitas klasifiki la malakcepton de sangotransverŝado inter la konsciencaj objektoj.

Ĉiel ajn, la Jehovo-atestantoj estas sukcese kuracataj de miloj da kuracistoj, kiuj uzas aliajn kuracojn ol la sangotransverŝadon. Donante privilegion al la alternativaj formoj, la Jehovo-atestanto atestas sian volon elekti klare kaj pripenseme. Ili cetere ne estas la solaj por elekti tiun ĉi alternativon. Pli kaj pli da kuracatoj malakceptas sangotransverŝadon pro aliaj motivoj ol religiaj.

Kiel atestite en la *SOFRES*-studo, la Jehovo-atestantoj estas perfekte integritaj en la socio. Ili partoprenas en la sociaj agadoj, kaj kulturaj kaj sociaj, kaj ili submetiĝas al la devo enskribi sin en la elektantarajn listojn. La Jehovo-atestantoj estas tre ligitaj al la kristanaj valoroj, sur kiuj fondiĝas la harmonia familia vivo. Baziĝante sur la evangeliaj principoj, la Jehovo-atestantoj rekomendas akordiĝeman kondukon, respekton pri la konvinkoj de la familianoj, kiuj ne samopinias pri ilia fido kaj la necesan penon por antaŭŝirmi la familion, kiun ili rigardas kiel dian institucion.

La Ŝtatpotenco agnoskis la Jehovo-atestantojn kiel kulturan asocion partoprenan, tiel konfirmante la religian distingajon de ilia praktikado, kaj konstatis, ke ili neniel maltrankviligas la publikan ordon.

Jean-Marie BOCKAERT  
Francio

La rubriko „Leteroj” estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj kaj pri artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO. Leteroj por publikigo estu senditaj al [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net) aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.



# Kaj Pilato lavis siajn manojn...

de Paul PEERAERTS

**L**a 20an de aprilo 2004 la ĉina registaro eldonis dokumenton n-ro 11 *Informo pri la laboro por konservi stabilecon*, en kiu ĝi avertis, ke okaze de la 15a datreveno de la protestoj en la placo Tiananmen ĉinaj disidentoj povus veni al la kontinento, kio povus endanĝerigi la politik-socian stabilecon de la ŝtato. La registaro insiste petis ĉiujn ĵurnalistojn nenion raportu pri la tiel nomataj „eventoj de la 4a de junio”.

Shī Tāo estas ĉina ĵurnalista, kiu laboris en 2004 por la ekonomia revuo *Contemporary Business News*, eldonita en la ĉina provinco Hunan. Ankaŭ li ricevis la registaran peton. Pri la „eventoj” li nenion raportis, sed hejme, per sia privata retadreso de *Yahoo!*, li sendis resumon de la dokumento al la transmara retejo *Asia Democracy Foundation* (Fondaĵo por demokratio en Azio), kiu publikigis ĝin en siaj paĝoj. Kiam la ĉina registaro rimarkis tion, ĝi petis la honkongan oficejon de *Yahoo!* kontroli, kie estis la liko, kaj transdoni la personajn donitaĵojn de la sendinto. *Yahoo!* donis la informojn, ne demandante, kial ili estas bezonataj. Tuj poste, la 24an de novembro 2004, Shī Tāo estis arestita. Komence de 2005 li estis „aŭdata” kaj punita per dekjara mallibereco pro likigo de ŝtataj sekretoj.

Ĉio ĉi do okazis jam antaŭ pli ol du jaroj. Tamen la internacia gazetaro reprikomentis la kazon, kiam en junio la *World Organization for Human Rights USA* (La monda organizaĵo por homaj rajtoj, Usono), kune kun la ĉina disidento Wang Xiaoning kaj lia edzino Yu Ling, antaŭ tribunalo en

Kalifornio (Usono) postulis de *Yahoo!* financan sendamaĝigon en nekonata sumo. La organizaĵo diras, ke *Yahoo!* per la transdono de privataj donitaĵoj severe endanĝerigis la ĵurnaliston Shī Tāo kaj aliajn politikajn disidentojn.

## Bedaŭro

Preparolanto de *Yahoo!* bedaŭris, ke „uzantoj de ĝia retservo en Ĉinio estis



*Shī Tāo, ĉina ĵurnalista, kiu estis enkarcerigita pro informoj de Yahoo!*

enkarcerigitaj, ĉar ili sendis siajn politikajn ideojn tra Interreto”, sed argumentis, ke *Yahoo!*, same kiel ĉiuj aliaj eksterlandaj firmaoj en Ĉinio, devas obei la lokajn leĝojn. La granda plimulto de la

akciuloj de *Yahoo!* ŝajne samopiniis. La peto de ĉinaj uzantoj, ke *Yahoo!* entute ne plu konservu la personajn donitaĵojn de siaj retuloj, por ke tiuj ne povu esti misuzataj, estis rifuzita de 85 % de la akciuloj de la entrepreno. Kontraŭ alia propono, ke *Yahoo!* kreu komisionon, kiu kontrolu, ke ne estu helpataj totalismaj politikaj reĝimoj, kiuj ne subtenas homajn rajtojn, oni voĉdonis per preskaŭ 96 % ... La internacia renoma firmao decidis lavi siajn manojn kiel Pilato: temas ja pri interna politika decido de alia ŝtato, tio ne estas nia afero.

Kiel finiĝos la proceso kontraŭ *Yahoo!* estas ĉi-momente ankoraŭ ne konata, sed ĉiuj mirus, se malgranda Davido, la asocio por homaj rajtoj, gajnus kontraŭ la borsa giganto kaj ties nova – ironie ĉindevena – estro Jerry Yang.

## Ĉiu alklako gravas

Ĉu ni povas iom puŝi al justeco, se estonte ni ne plu uzos la retserĉilon de *Yahoo!*, sed uzos tiun de *Google*, kaj se ni instigos aliajn fari same? Nu ja, teorie jes. „Ĉiu alklako gravas”, iam diris retspecialisto. Sed ekzistas ankoraŭ aliaj metodoj por protesti. Miloj da klientoj de pagataj servoj de *Yahoo!*, inter aliaj de *Flickr* (vidu artikolon ĉi-prie aliloke en tiu ĉi numero), nuligis siajn kontojn en junio, interalie pro la kazo de Ĉinio. Tio estas la „interna politika afero” de tiuj klientoj, kontraŭ kiu neniu povas ion fari. Kaj ĉar „la kliento reĝas”, precipe en Usono, iliaj etaj, sed multnombraj protestoj eble tamen utilis al Shī Tāo kaj liaj kolegoj. ■



# Diantoj ... kaj dornoj

Post 48 jaroj da diktatoreco la portugala popolo finis la faŝisman reĝimon la 25an de aprilo 1974 per sensanga revolucio. Portugaloj nomas ĝin la „Dianta Revolucio”, ĉar la popolo enmetis diantojn en la pafilojn de la soldatoj.

Pasis 33 jaroj. La portugala popolo starigis demokratian socion, kaj la lando estas membro de Eŭropa Unio. Tamen, ĉefe de antaŭ du jaroj, la signoj pri politika retroiro estas maltrankviligaj. Portugaloj vidas iom post iom, kiel estas detruataj libereco kaj demokratio. Tio ne estas troigo. Diktatoroj estas polpoj, kapablaj alivestiĝi, kiuj kreskas rapide, etendante siajn tentaklojn sur la tutan socion ĝis en la personan vivon de ĉiu.



**K**orupto disvastiĝas tra la socio. Skandaloj enormaj koncerne ĉefe politikistojn, privatajn universitatojn kaj futbalestrojn. Senlaboreco kreskis ĝis preskaŭ duonmiliono da homoj, kaj estas pli ol unu miliono da personoj, kies laborkontraktoj estas limdatigitaj.

Infankrimuloj eskapas de la justico. En lando, kie koruptuloj kaj infankrimuloj estas apenaŭ punitaj post multaj jaroj da tribunalaĵ sesioj, amaskomunikiloj ĵus sciigis, ke sinjorino 76-jaraĝa estis akuzita pro ŝtelado de haŭt-kremo kun valoro de 3,99 eŭroj. La sinjorino laŭdire tion faris post reveno de kurackonsulto en la Portugala Instituto Kancerologia. Tro da rigoro por etaj krimoj, malrigoro por veraj krimuloj.

## Armil-komercado

Antaŭ nelonge la amaskomunikiloj suspektis, ke la licenciĝo de la ĉefministro José Sócrates [ĵuzé sókrates] kiel inĝeniero estis plenumita iel strange. Sócrates, membro de la Socialista Partio, ne finis la superan kurson pri inĝenierado pro manko de kvin fakoj. Fine li akiris la kvin fakojn en *Universidade Independente*, privata universitato akuzita pro interligo kun armil-komercado.

La amaskomunikiloj dubis pri la sukceso en la kvin fakoj, i.a., ĉar kvar el ili li akiris la saman jaron kun la sama profesoro. Ankaŭ estas datoj, kiuj ne



koincidas kun la licenciĝo. Cetere telefonvokoj el la registaro provis timigi ĵurnalistojn kaj dokumentoj mistere malaperis. Mokas televidaj humoristoj, ke la ĉefministro estas falsa inĝeniero.

Al la portugala popolo ne gravas, ĉu la ĉefministro estas aŭ ne estas inĝeniero. Gravas, ke li prezentis identigilajn paperojn en la parlamento kvazaŭ inĝeniero, kiam li ankoraŭ ne havis la licencion. Ankaŭ gravas, ĉu li honeste plenumis sian studprogramon.

### Anekdoto

Estas aliaj, rilataj aferoj. Instruisto Fernando Charrua [fernándu ŝaŝúa], kiu laboris dum 19 jaroj en la Ĝenerala Estraro pri Edukado de la Nordo, kaj membras en la Socialdemokrata Partio, okupiĝis ĝis antaŭ nelonge pri rekonado de licenciĝoj kaj aliaj studgradoj en tiu ŝtata institucio.

Kiel normala portugalo li rakontis anekdoton pri la ĉefministro al kolego. La kolego sciigis la estron, kiu suspendis la instruiston. Poste la ministrejo pri edukado nuligis la suspendon, sed irigis la instruiston al la mezgrada lernejo, kie li laboris antaŭ 20 jaroj. La anekdoto temis pri la neinĝenieco de Sócrates. La kazon diskutis la portugala parlamento, kies deputitoj, de ĉiuj partioj, unuafoje interkonsentis pri io: nome, ke la registaro faligas la liberon en Portugalio.

Ĵurnalistoj, instruistoj, kuracistoj, esplorpolicistoj kaj ĝenerale la profesiuloj bone funkcias en Portugalio. Tamen ne estas facile bone labori, kiam la institucioj estas plenaj je polpaj tentakloj. Kelkaj blogoj en Portugalio estas kontrolataj de la polpo. Se iam mi malaperos el la reto, sen antaŭa informo, bonvolu suspekti.

Ĉi tiuj situacioj eble estas komunaj en aliaj membroŝtatoj de Eŭropa Unio. Ĉu pro tio la eŭropaj popoloj dubas kaj ŝanceliĝas pri subskribado de la Konstitucia Traktato en ĉi tia Eŭropo?

João José SANTOS

## ALBANIO

# Historia vizito

**L**a 10an de junio vizitis Albanion la usona prezidento George Bush. Ekde la fino de la unua mondmilito, kiam la tiama usona prezidento Wilson deklaris sin ĉe la Ligo de Nacioj favora al popola rajto pri memdecido, kio influis ankaŭ la akcepton internacian de Albanio kiel sendependa ŝtato, neniu usona prezidento vizitis Albanion.

Post la komunisma reĝimo restariĝis diplomaciaj rilatoj inter Albanio kaj Usono en 1991. Tiam Usono fariĝis preskaŭ la sola internacia advokato pri albanaj aferoj. La milita interveno en Kosovo de la Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO), kun ĉekape Usono, dum printempo 1999 konfirmis la fidon de la albanoj al la usonanoj kaj ilia registaro.

Prezidanto Bush restis nur sep horojn en Albanio. Li estas akceptita ĉe la

prezidanta palaco kaj ricevis la plej altan landan medalon. Poste li renkontis la ĉefministron, parlamentestrojn kaj du specialajn invititojn, la ĉefministrojn de Makedonio kaj Kroatio, rilate preporojn por akcepti la tri landojn venontjare en NATO. Cetere, dum la vizito Bush denove deklaris sian subtenon por sendependa kaj memstara Kosovo.

La vizito de Bush, malgraŭ ekstrema sekureco (deĵoris pli ol dek mil lokaj policanoj kaj eĉ mil usonaj soldatoj), montris, ke albanoj estas eble la plej usonema nacio en Eŭropo. Forestis ekzemple la kontraŭusonaj manifestacioj viditaj lastatempe en Ĉeĥio kaj Italio. Civitanoj venis per aŭtoj kaj eĉ per bicikloj el ĉiuj anguloj de la lando por bonvenigi la usonan prezidenton.

Bardhyl SELIMI



*Historia vizito – tiel albanoj ĉe la teknika universitato en Tirano karakterizis la viziton de la usona prezidento George Bush.*

NIĜERIO

# Elektoj sen elektiloj



EU EOM NIGERIA 2007

Inter la 14a kaj 21a de aprilo 2007 pli ol 60 milionoj da niĝerianoj rajtis voĉdoni por nova prezidanto, estroj de la 36 ŝtatoj kaj novaj federaciaj kaj ŝtataj parlamentanoj. La internacia komunumo sendis ne nur observantojn, sed ankaŭ monon por faciligi la laboron de Sendependa Elekta Komisiono.

En la historio de Niĝerio el ĉiuj voĉdonoj rezultis krizoj kaj poste ŝtatrenverso fare de la niĝeria armeo.

Tial niĝerianoj pensis, ke eble, post pli ol 25 jaroj da armea regado, la politikistoj jam lernis sian lecionon. Tiel ne estis.

El 50 registritaj partioj 24 prezentis kandidatojn por la ofico de prezidanto. La elposteniĝanta prezidanto, Olusegun Obasanjo, kies Popola Demokratia Partio (PDP) estris kaj la centran registaron kaj 26 ŝtatojn, promesis senfraŭdan voĉdonon. Tamen la federacia registaro uzis sian povon por bari fortajn kandidatojn.

## Tria mandato

Fakte al ĉiuj opozicianoj kaj eksaj amikoj de la prezidanto, kiuj kontraŭis lian provon ŝanĝi la konstitucion, por ke li ricevu trian mandaton, estis malpermesite kandidati. Multaj, i.a. la vicprezidanto Alhaji Atiku Abubakar, plendis ĉe tribunaloj kaj kortumoj. Sukcesis kandidati nur Atiku.

Cetere Obasanjo elektis kiel prezidanto-kandidaton la estron de la norda ŝtato Katsina, Umaru Yar'Adua. PDP akceptis la decidon de Obasanjo, kaj ĉiuj aliaj kandidatoj devis rezigni. Simile li elektis la ŝtatestro-kandidatojn. Tiel li kandidatigis por PDP nur siajn preferatajn subtenantojn.

Dum la elekto-tago niĝerianoj iris por voĉdoni, sed trovis mankon de

elektiloj, sekurec-agentojn por fortimigi opozicianojn, perforton kaj mortigon. Fine de la elektado eĉ tie, kie ne okazis voĉdonado, oni anoncis rezultojn kaj deklaris PDP-on venka.

## Perforto kaj fraŭdado

La opozicio petis nuligon de la balotoj, sed vane. Internaciaj observantoj subtenis la opozicion kaj sendepende konfirmis, ke ja okazis perforto kaj fraŭdado. Tamen la Sendependa Elekta Komisiono, subaĉetita de Obasanjo kaj la reganta partio, deklaris Umaru Yar'Adua prezidanto. La komisiono donis al li pli ol 80 % de la federacia parlamento kaj 28 el la 36 ŝtatoj.

Komence aliaj landoj rifuzis rekoni la novan prezidanton. Tamen poste pli kaj pli da ŝtatoj ekgratulis la novulon. Nur Usono kaj kelkaj eŭropaj landoj insistis, ke oni korektu la erarojn en la voĉdonado, kaj konsilis, ke opozicianoj iru al la tribunaloj anstataŭ al strat-manifestacioj. Kelkaj opozicianoj sekvis la konsilon, sed kredeble multon atingos.

Intertempe opozicianoj petis, ke niĝerianoj proteste restu hejme, dum estos inaŭgurata la nova prezidanto. Ankoraŭ ne certas, ĉu ripetiĝos la historio, kaj ĉu intervenos la armeo.

Princo Henriko OGUINYE/pg

AGÊNCIA BRASIL



*La Sendependa Elekta Komisiono, subaĉetita de Obasanjo kaj la reganta partio, deklaris Umaru Yar'Adua prezidanto.*



# „Flickr” malbone flikas

**F**lickr ([www.flickr.com](http://www.flickr.com)), unu el la multaj servoj de la giganta firmao Yahoo!, estas la plej granda reta foto-arkivo de la mondo. Centmiloj da fotoamatoroj kaj profesiuloj montras tie siajn verkojn. La 13an de junio la germanlingvaj vizitantoj de Flickr subite rimarkis, ke multaj bildoj, kiujn ili en la antaŭaj tagoj povis vidi, nun subite ne plu estas alireblaj. Anstataŭ la foto venis mesaĝo: „Tiu ĉi foto ne estas disponebla al vi”.

Komence oni emis kredi, ke temas pri cimo en la programaro, sed post kelkaj horoj la realo montriĝis alia. Iu rimarkis malgrandan ŝanĝon – tute ne anoncitan – en la regularo: „Se via identiga numero havas kiel bazon Singapuro, Germanio, Honkongo aŭ Koreio vi povos vidi nur bildojn kun sekura enhavo”.

Tiu ĉi ekscio ene de kelkaj horoj kaŭzis lavangon da protestoj. Miloj da foto-grafoj kaj fotografaj grupoj el la tuta mondo afiŝis protest-tekston aŭ -foton sur sia ĉefpaĝo: „Ne al la cenzuro!” Tute strange, Flickr dum preskaŭ 24 horoj ne reagis. Nur la postan tagon venis mallonga komunikaĵo: „La nuna situacio estas por ni [Flickr] tre malgrabla, sed – kredu nin – ni ne havas alternativon.”

## Lokaj leĝoj

Intertempe la protestoj daŭris kaj multaj minacis venontjare ne rekotizi. Kelkaj protestafiŝoj iĝis eĉ tiel popularaj, ke ili aperis en la ĉefpaĝo inter la plej vidataj fotoj. Post plenaj du tagoj da protestado venis nova oficiala komunikaĵo: „La decido ŝanĝi la Flickr-sperton en Germanio neniam rilatis cenzuron. Ĝi estas farita en provo certigi, ke Yahoo!-Germanio estu konforma al la lokaj leĝoj.”

Pri kiuj leĝoj temas, ne estis dirite. Germanaj juristoj diskutis, sed ne trovis

precizajn leĝojn. Eble la cenzurado baziĝas sur *Jugendschutzgesetz* (leĝaro por protekti gejunulojn), plis-triktigita, post kiam en 2002 19-jaraĝulo en Erfurt mortigis instruistojn kaj lernantojn.<sup>1</sup>

Laŭ tiu ĉi leĝo montri „danĝerajn fotojn” al junuloj estas krimo. Sed Flickr baris aliron ne nur al junuloj, sed al ĉiuj germanlingvaj abonantoj. Cetere ĝi baris milionojn da fotoj, kies „danĝero” estas ridinda. Tiel Flickr provis fliki sian paĝaron laŭ malbone pripensita maniero.

Paul PEERAERTS

*Inter la miloj da protestafiŝoj ĉefe en la germana kaj angla jen kaj jen ankaŭ iu en Esperanto, kontraŭis la cenzuron de fotoj por germanlingvaj abonantoj.*



1. Du semajnojn poste oni informis, ke la koncerna leĝo estas Staatsvertrag über den Schutz der Menschenwürde und den Jugendschutz in Rundfunk und Telemedien (Federacia traktato pri la protektado de la homa digno kaj de la junularo en radio, televido kaj Interreto).



*Tiun foton, kaj milionojn da aliaj, germanoj kaj aliaj ekde junio ne plu rajtas rigardi. Eble, laŭ leĝaro por protekti gejunulojn, ĝi estas „danĝera”.*

ĈINIO

# Nova mono por malnovaj domoj



*Necesas multe da mono por ripari kaj restaŭri malnovajn konstruaĵojn.*

*La interno de tradicia ĉina konstruaĵo.*



**E**n la gubernio Shitai de Anhui, Ĉinio, situas la malnova domo Cuipingju, konstruita kiel te-trinkejo antaŭ pli ol 200 jaroj. Dum multaj jaroj ĝi kadukiĝas pro manko de riparoj. Pasintjare la posedanto de la domo intencis vendi ĝin al sveda tekmercisto kontraŭ 200 000 juanoj (ĉ. 20 000 eŭroj).

Kiam amaskomunikiloj priraportis la negocon, intervenis la loka registaro kaj malhelpis la vendon, dirante, ke la konstruaĵo estas kultura heredaĵo protektata.

Li Yikun, 63-jara, estas la 9a heredanto de la malnova domo. Pri la vendo li klarigis: „La domo estas konstruita kontraŭ giganta elspezo. Tiam ses metiistoj energie laboris dum tri jaroj por krei lignoskulptaĵojn por la domo. En la lastaj jaroj mi plurfoje petis la registaron enigi ĝin en la liston de kulturaj heredaĵoj. Tamen mia klopodo estis vana.”

## Granda ŝarĝo

Li daŭrigis: „Mi elspezas ĉiujare pli ol 2000 juanojn por ripari la domon. Tio estas granda ŝarĝo por mia familio. Mi decidis ĝin forvendi, kiam la sveda komercisto proponis aĉeton. Fakte mi ne volas forvendi ĝin, tamen estas pli bone vendi ĝin ol vidi ĝin disfali.”

Antaŭ naŭ jaroj okazis simila afero en la gubernio Xiuning de la sama provinco. La malnova domo Yinyutang de la vilaĝo Huangcun estis vendita al Usono post sep-jara traktado. Oni malmuntis de la malnova domo 700 lignaĵojn, 8500 brikojn kaj 500 ŝtonaĵojn, kiuj estis enmetitaj en 40 kontenerojn.

La aĉetanto elspezis 125 milionojn da dolaroj por transporti la malmuntitan domon al Usono. Poste oni rekonstruis ĝin en usona muzeo. En junio 2006 la muzeo malfermiĝis al la publiko. Por la muzeo oni instalas retpaŝaron, kiu enviciĝis inter la 10 plej furoraj retpaŝaroj en Usono.

## Manko de monrimedoj

Chu Xiaohua, direktoro de la gubernia kultura administracio, diris, ke la domo Yinyutang estas konstruigita de loka komercisto Huang en la 17a jarcento, kaj ĝi estas heredita de posteuloj de lia familio. Laŭ tiamaĵ normoj la kultura administracio ne povis konfirmi ĝin kultura heredaĵo. Pro manko de monrimedoj, la domo sen riparado estus disfalonta, se la posedanto ne forvendus ĝin.

Antaŭ centoj da jaroj komerco prosperis en la suda regiono de Anhui. Lokaj riĉuloj konstruigis grandan nombron da delikataj domoj, praulaj temploj, memoraj arkaĵoj kaj pontoj laŭ ĉina tradicia arkitekturo. Sed tiuj konstruaĵoj estas nek enlistigitaj kiel kulturaj heredaĵoj nek protektataj de la registaro.

Ironie estas, ke lastatempe iu ĉina kultura instituto kolektis ĉirkaŭ 10 milionojn da juanoj por rekonstrui la domon Yinyutang sur la origina loko. La instituto planas iom post iom restaŭri ĉiujn konstruaĵojn de la vilaĝo Huangcun.

Alice Liu





SANO

# Planoj senmaskigitaj

*Laŭ Thomas Zeltner gravas nun akiri maskojn por evitigi panikan amasan aĉetadon kaj la riskon infektiĝi de la birda gripo.*

**K**vankam maloftas en ĵurnalaj titoloj mencioj pri birda gripo, la Svisa Oficejo pri Publika Sano (SOPS) plu klopodas prepari la loĝantaron kontraŭ la epidemio. Ĝi ĵus rekomendis, ke ĉiu sviso akiru 50 higienajn maskojn. Tiuj estu uzataj, se la viruso tiel evoluos, ke ĝi povos transiri de homo al homo.

Laŭ Thomas Zeltner [tómas céltner], la estro de SOPS, gravas nun akiri maskojn por evitigi panikan amasan aĉetadon kaj la riskon, ke fabrikantoj ne plenumos mendojn. La maskoj ne tute preventos kontakton, ĉar la mikroboj restas en la aero kaj maskoj ne estas hermetikaj. Tamen ili malpliigas la riskon de malsanigo, aparte en fermitaj lokoj, ekzemple en publikaj veturiloj.

## Vakcino

Zeltner opinias, ke la ĉefa kontraŭgripa ŝirmilo estas vakcino. Do la svisa registaro staplas vakcinon por proksimume ok milionoj da personoj. Danke al kompletiga aktivilo la vakcino verŝajne kontraŭstaros novajn virus-mutaciojn.

Laŭ prognoza modelo, epidemio daŭros ĉirkaŭ ses semajnojn, kiel tra-



dicia gripo. En la plej bona okazo la publiko povos normale plu vivi. Tamen lernejoj probable estos fermitaj, ĉar porti maskon estos troa trudo ĉe infanoj.

La maskoj jam haveblas en superbazaroj kontraŭ 4,90 svisaj frankoj (ĉ.

2,90 eŭroj) kartone po 50 maskoj. La Monda Organizaĵo pri Sano studos la sperton en Svislando, antaŭ ol decidi, ĉu rekomendi, ĉu mondscale aĉeti maskojn.

Marteno ECOTT



## ALBANIO

# Abiturienta ov-acio



**E**kde kelkaj jaroj, fine de la lerneja jaro, abiturientoj per stranga kutimo montras sian ĝojon. Ili aĉetas abunde farunon kaj ovojn kaj superŝutas unu la aliajn per ili. Krome ili kondukas tute eksterordinare, bruante kaj drinkante, kaj farbante kaj surskribaĉante la lerneajn murojn.

Antaŭe tiel ne okazis, ne nur pro la komunisma reĝimo, sed ankaŭ pro tradicio. Oni ne scias, de kie venis tiu ĉi nova moro. Tamen instruistoj kaj aliaj civitanoj ĝin ne ŝatas kaj esperas, ke baldaŭ ĝi ne plu okazos.

Bardhyl SELIMI

*Abiturientoj de la tirana tutlanda hotelmastruma kaj turisma mezlernejo amuziĝas per faruno kaj ovo.*

## SAMSEKSEMO

# Nek publikaj, nek sekuraj

**E**videntiĝas, ke samseksemuloj en Litovio ankoraŭ ne sentas sin plenrajtaj civitanoj. Tion montras provoj de la ligo de samseksemuloj de Litovio iniciati informan kampanjon kadre de la tutmonda tago kontraŭ homofobio.

Parto de la kampanjo celis afiŝojn sur trolebusoj en la ĉefurbo Vilnius kaj en Kaunas. La busoj estus ornamitaj per ŝildoj kun la ĉielarkaj koloroj – simbolo de la samseksemuloj – kun sloganoj: „Samseksemaj dungitoj rajtas esti publikaj kaj sekuraj”, „Ankaŭ gejo povas servi en la polico”, „Lesbanino povas labori en lernejo”. Tamen nek en unu, nek en la alia urbo aprobis magistratoj la kampanjon.

La ĉefurbestro de Vilnius, Juozas Imbrasas, diris: „Ni estas toleremaj rilate ajnan seksan inklinon, tamen ni

donas prioritaton al tradiciaj familioj kaj strebas propagandi familiajn valorojn. Tial ni ne subtenas la ideon pri publika demonstrado de samseksemaj ideoj”.

## Ĉielarka flago

Fiaskis ankaŭ iniciato organizi du-tagan feston, „Ĉielarkaj tagoj 2007”, por disvastigi egalajn rajtojn de samseksemuloj kaj lukti kontraŭ diskriminacio kaj maltoleremo. Tiu ĉi festo estus parto de eŭropa iniciato kulminanta per publika evento, dum kiu etendiĝus 30 m longa ĉielarka flago.

La prezidanto de la ligo de samseksemuloj de Litovio, Vladimir Simonko, bedaŭris, ke la iniciato, kiu komencu dialogon, fiaskis, ĉar la socio evidentiĝas „nesufiĉe matura”.

Esploroj indikas, ke 61 % de la loĝantaro de Litovio ne volus aparteni



*Ŝildoj por atentigi pri egalaj rajtoj por samseksemuloj ornamas nur teorie trolebusojn en Vilnius kaj Kaunas.*

al organizaĵo, en kiu membras ankaŭ samseksemuloj; 51 % ne voĉdonus por parlamenta kandidato, se tiu publike deklarus sian samseksemon; kaj 47 % opinias, ke samseksemo estas malsano kuracenda.

LAST



# Legantoj mem decidu

**A**peris antaŭ nelonge furorlibro en la angla lingvo pri la japana kronprincino Masako. La japana traduko devis aperi en marto, sed ĝi estas nuligita. La aŭtoro, Ben Hills [hilz], en sia libro (esperante: *Princino Masako. Malliberulino de la Krizantema Trono. La tragika vera rakonto de japana kronprincino*) kritikis la malmodernan kaj burokratan influon de la Buroo pri Kortegaj Aferoj (BKA), kaj nun japanoj demandas sin, ĉu BKA iel subpremis la tradukon.

Masako naskiĝis en 1963. Ŝi kreskis ĉefe eksterlande kaj parolas multajn lingvojn. Studinte ĉe la universitatoj de Oksfordo, Harvard kaj Tokio, ŝi eklaboris ĉe la ministrejo pri eksterlandaj aferoj. Ŝi estas ĉiel moderna kaj kapabla virino kun internaciaj spertoj.

Tamen ŝia vivo ŝanĝiĝis post la edziniĝo en 1993 al la japana kronprince Naruhito. Vivado en la imperiestra familio fariĝis sufoka pro multaj konvencioj. Ŝi ne povis utiligi siajn sperton kaj kapablojn. Masako devis fariĝi obeema edzino kaj naski viran bebon kiel kronheredanton. Baldaŭ ŝi mense malsaniĝis (oficiale „alĝustiga malordo”, sed laŭ Hills „depresio”) kaj preskaŭ malaperis el publika vido.

## Konservativaj

La anglalingva originalo troviĝas inter la plej furoraj eksterjapanaj libroj ĉe [www.amazon.co.jp](http://www.amazon.co.jp). Tie, laŭ leganto-rekomendoj, ĝi havas nur du stelojn kaj duonon, dum aliaj furorlibroj ĝenerale havas pli. Supozeble multaj konservativaj japanoj kritikis la libron.

Kutime japanoj ne skribas malestimo pri la imperiestra familio, parte pro

ĝenerala respekto kaj parte pro timo de minacoj aŭ eĉ fizikaj atakoj fare de ekstrem-dekstruloj. Tamen ĉi-foje la „malpermeso” de la traduko de la kritika Hills-libro certigas la impreson, ke la princino pro la burokrata premo de BKA vere malsaniĝis.

Nuligi la tradukon nenion solvos. La ĉeesto de tiel nomataj malprecizaj frazoj en la libro ne estas sufiĉa kialo por malpermesi japanlingvan eldonon. Legantoj mem decidu.

HAYASI Kaneyuki



Grupfoto de la japana imperiestra familio (Masako maldekstre)



Kontribuojn por la rubriko *Moderna Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al [moderna\\_vivo@monato.net](mailto:moderna_vivo@monato.net).

# Ni renkontiĝu

## ĉe la monumento al Korczak

**L**a 1an de junio 2006, simbole en la internacia tago de la infanoj<sup>1</sup> en Varsovio estis inaŭgurita monumento omaĝe al Janusz Korczak [januŝ korĉak] kaj la orfoj, kiujn dum sia vivo li protektis, amis kaj estimis. Ĝi estas starigita sur tragedie simbola loko, kie troviĝis la lasta orfejo de Korczak.

De tie, matene la 6an de aŭgusto 1942, laŭ ordono de germanaj nazioj, oni forpelis d-ron Korczak (Henryk Goldszmit) kun liaj ĉirkaŭ 200 prizorgatoj kaj lia dungitaro. Dum terure malvarma tago ili devis piediri tra la geto al la *Umschlagplatz* (Transŝarĝa placo). Kaj de tie inter amaso da aliaj viktimoj ili forvojaĝis sian lastan vojon al koncertejo Treblinka. Samtage ili estis gasumitaj kaj forbruligitaj ...

La ideo konstrui monumenton honore al Korczak ekestis baldaŭ post la fino de la dua mondmilito. Fondiĝis komitato: amikoj, kelkaj savitoj, iom da kunlaborintoj. Sed pasis jaroj.

### Korczak fariĝis konata

Dume plurloke en la mondo oni omaĝis lin, diskonigis liajn profunde humanismajn ideojn. Nur en Varsovio, kie dum la tuta vivo li laboris, estis silentado ...

En la 70aj jaroj oni starigis buston pri li, antaŭ la enirejo al la orfejo ĉe strato Krochmalna 92 (nun Jaktorowska), kie 30 jarojn li laboris ĝis en 1940 li estis enigita en la geton de Varsovio.

Komence de la 80aj jaroj oni konstruis tre kortuŝan monumenton, sed lokis ĝin ... en judan tombejon, ĉe strato Okopowa. La solena malko-

vro okazis la 28an de oktobro 1982. Ĉeestis amikoj kaj adeptoj de la ideoj de Korczak el la tuta mondo. Kristanaj klerikoj kune kun rabeno preĝis. Sed mi substrekas: ne ie en la centro de Varsovio, sed en juda tombejo.

### Simile pri Zamenhof

Indas memorigi malĝojigan fakton el pli fora pasinteco: kiam dum la postkongreso en Bjalistoko, en 1931, estis metita bazangula ŝtono por monumento al d-ro L.L. Zamenhof, laŭ permeso de lokaj instancoj en tre bona loko, la dekstrula gazetaro – precipe la eklezia – protestis, ke prefere oni loku tiun monumenton en parko, kie „la judoj kutimas promeni”. Trudiĝas demando ... al kiu malfacile estas respondi: ĉu la homaro iam alkreskos al tia homeco, ke ĝi komprenos ke homoj kiel Zamenhof aŭ Korczak per sia strebado plibonigi la mondon apartenas ne al unu etno sed formas trezoron por la tuta homaro ...?

Kiel menciite, la kortuŝa monumento pri Korczak estis starigita en la juda tombejo, ofte vizitata, sed la varsovianoj ĝenerale kaj certe la aliregionaj aŭ eksterlandaj vizitantoj, krom la judoj, malofte tien venadas. Krome, ĝi estis konstruita el sinteza rezino, kaj iom post iom ĝi komencis difektiĝi. Formiĝis do denove komitato por starigi, laŭ la sama aspekto, pli firman bronzan monumenton samloke.

Inde okazis ĝia inaŭguro la 6an de aŭgusto 2002, je la 60a datreveno de la neniigo de d-ro Korczak kaj liaj georfoj. Priskribo pri tio aperis en *Monato* de septembro 2002.

### Nova monumento

Nun, post denove pluraj jaroj, oni faris decidan novan paŝon: fine nun estas starigita je lia omaĝo, kiel dirite sur simbola loko ligita al la lastaj monatoj de lia vivo, la monumento, centre de Varsovio, kiu vere proksimigos Korczak kaj liajn ideojn al pli vasta publiko kaj pola kaj eksterlanda. Fine okazis simbola „forkonduko” de tiu granda humanisto el la izolejo ĝisnuna.

Korczak plurfoje montris sian korligitecon kun Varsovio, eĉ enpelite en la limigitan spacon de la geto, eĉ vivante en teruraj kondiĉoj. Li skribis interalie: „Mi amas Vistulon varsovian, kaj deŝirita de Varsovio mi sentas neelteneblan sopiron. Varsovio estas mia, kaj mi estas ĝia. Mi diras pli – mi estas ĝi! Kune kun ĝi mi ĝojis, kune kun ĝi mi malĝojis. [...]” Ĉi-loke valoras substreki, ke ĉi citaĵo troviĝas en lia *Taglibro* je la dato 15 V 1942, do malpli ol tri monatojn antaŭ lia neniigo ...

La iniciaton realigi la nunan monumenton entreprenis en 1999 la Pola Asocio Janusz Korczak kaj la Fondaĵo „Shalom”. En la honora komitato estis artistoj, sciencistoj, politikistoj. Honoran protektadon je la tuto akceptis la edzino de la tiama prezidento de la pola respubliko, s-ino Jolanta Kwaśniewska. Grandelane kunlaboris prof-ino Jadwiga Binczyska (de Pola Asocio J. Korczak) kaj s-ino Golda Tencer (Fondaĵo „Shalom”). Por kolekti la necesan monon oni aranĝis interalie koncertojn, dum kiuj okazis aŭkcioj de artaĵoj kaj unikaj libroj donacitaj tiucele. Similaj aranĝoj okazis ankaŭ eksterlande, precipe en Britio.





*En la internacia tago de la infanoj en Varsovio estis inaŭgurita monumento omaĝe al Janusz Korczak kaj al la orfoj, kiujn dum sia vivo li protektis, amis kaj estimis.*



En 2001 estis konkurso por projekti la monumenton. Prezidis la ĵurion prof-o Adam Myjak de la Akademio de Belartoj de Varsovio. El la plej eminentaj projektoj fine oni elektis por realigado tiun de Zb. Wilma kaj B. Chmielewski. En septembro 2003, sub granda intereso ankaŭ de urbaj aŭtoritatuloj, oni metis la bazangulan ŝtonon. Bedaŭrinde, la realigo prokrastiĝis ĉar la komitato ne sukcesis kunigi la bezonatan monsumon. Tiam la ĉefaj iniciatintaj organizaĵoj sin turnis al la instancoj de Varsovio mem. Tiuj transprenis la taskon.

### **Antaŭ unu jaro.**

La 1an de junio 2006 okazis do fine la malkovro de la monumento. El tuta Pollando infanoj, precipe el lernejo kun la nomo Korczak, venis al la solenaĵo; ankaŭ de aliloke. Ĉeestis la mem-

broj de la komitato, kaj pluraj gastoj. La prezidento de la respubliko, Lech Kaczyński en sia parolado esprimis kontenton, ke la monumento staras en la centro de Varsovio, vid-al-vide al la Palaco de la Junularo. Li ankaŭ diris ke „pri tiu monumento Varsovio atendis tro longe. Ni ŝuldis tion al li jam tuj post la milito. Tamen, ni devas esti kontentaj, ke fine ĝi realiĝis”.

Post la oficialaj paroladoj la gvidadon transprenis la infanoj. Sur la podio aperis laŭvice ensembloj kun scenoj bazitaj je la verkoj de Korczak. La programo estis vere varia: koruso kun tekstoj liaj, surscenejigo de eroj el liaj plej konataj libroj, kiel ekzemple *Reĝo Maĉjo la Unua*, poemoj, dancoj en popolaj kostumoj.

La altnivelaj prezentadoj de la infanoj funde kortuŝis la homojn. Zb. Wilma emfazis ke „... la plej grava, plej

bela omaĝo al Korczak certe estis la amuziĝantaj infanoj ĉe la piedestalo de lia monumento”.

Sur la granda placo, kie ĝi nun staras, jam de jaroj renkontiĝas la junularo. Ĝi nun riĉiĝis per bela esprimpova monumento.

Verŝajne ankaŭ la esperantistoj, kiuj vizitos Varsovion, ne preterpasos ĉi tiun monumenton indiferece. Oni honoru lin en la urbo, kie li vivis kaj laboris. Ni tie renkontiĝu.


Zofia BANET-FORNALOWA

1. La tago de la infanoj jam en kelkaj landoj estas festata, interalie en Ĉinio, Germanio, Barato, Pollando, Usono. Ndlr.



Kontribuojn por la rubriko *Spirita Vivo* de MONATO kunlaborantoj sendu al [spirita\\_vivo@monato.net](mailto:spirita_vivo@monato.net).

# Tri milionoj da aŭtoj en



**La Pekina Komitato pri Trafiko anoncis, ke en majo 2007 en la ĉina ĉefurbo estis almenaŭ tri milionoj da privataj aŭtomobiloj. Tio montras, ke la urbo eniris la aŭtan socion.**



# n Pekino



la nombro superis du milionojn. Por plimultiĝi ĝis tri milionoj estis bezonataj nur tri jaroj kaj naŭ monatoj. Tiu cifero estis atingita multe pli frue ol la specialistoj pri urba disvolviĝo antaŭkalkulis.

## Ĉu estas ekonomia sukceso?

Oni povus konkludi, ke la ekonomia konstruado de la urbo brile sukcesis, sed tio estas unuflanka vidpunkto. Dum intervjuo kun la internacie fama profesoro Lu Huapu, estro de la Trafika Instituto ĉe Quinghua-Universitato, ĵurnalisto trovis, ke kompare kun privataj en evoluintaj landoj, kiuj plejparte posedas aŭtojn por per ĝi pasigi libertempon aŭ malstreĉi sin, la aĉetcelo de plimulto de la pekinanoj estas nur por eviti la embarason, kaŭzatan de malbona publika trafiko.

Lu Huapu substrekis: „Pekino nun alfrontas pezan trafikajn ŝarĝon. Preskaŭ ĉiutage estas terura trafikŝtopiĝo. La plej ŝlosila problemo estas, ke al la urbo Pekino, dense loĝata, mankas kapabla sistemo de publika trafiko. Laŭ statistiko nuntempe en Pekino la publika trafiko havas porcion de nur 20 % de la tuta urba trafiko, dum en Novjorko, Tokio kaj

aliaj urboj, la publika trafiko ĝenerale havas 70 %.”

## Atentiga signalo

Unu el la zorgigaj problemoj estas, ke specialistoj kaj koncernaj instancoj de la ĉina registaro nepre bezonas fari pli sciancan prognozon pri la kresko de aŭtokvanto en Pekino kaj aliaj urbegoj. Estonte, la tempoperiodo, en kiu la civilaj aŭtoj de Pekino atingos kvar milionojn, certe pli mallongos ol la bezonita tempo de du milionoj ĝis tri milionoj.

La trafikŝtopiĝo iĝis por pekinanoj tre doloriga problemo. La pligrandigo de la aŭtokvanto certe ne povos ĝin solvi. Necesas senprokraste plani rimedojn por adaptiĝi al rapidega intensiĝo de trafiko. Sen apliko de sciancaj metodoj kaj efika administrado, la kombino de efikoj, kaŭzita de la aŭtomobila socio kiel, ekzemple, kresko de energikonsumo kaj grandkvanta eliĝo de nocaj gasoj, povas konduki al katastrofo. Do, tri milionoj da aŭtoj kiel turnopunkto levis por la ĉina ĉefurbo atentigan signalon.

Mu Binghua

**E**kde la pasinta jaro la nombro de privataj aŭtoj en la urbo kreskis kun rapideco de po 1000 en unu tago. Kiam en 1950 la nova Ĉinio fondiĝis, en Pekino troviĝis nur 2300 civilaj aŭtoj. En februaro 1997 la nombro atingis unu milionon; por tio estis bezonataj pli ol 40 jaroj. Pasis nur iom pli ol ses jaroj, ĝis en aŭgusto 2003

# Lingva diverseco



Manifestacio por la lingva diverseco en Carcassona (Okcitanio), oktobre de 2005

Iom post iom la lingva diverseco de la mondo pli kaj pli malriĉiĝas. En preskaŭ ĉiuj kontinentoj kaj landoj lingvoj konstante mortas. Kompreneble, tiu fenomeno ĉiam okazis. Malaperis la lingvoj de la antikva Egiptio, de Babilonio, de Ugarito, kaj la latina antaŭ longe ĉesis esti parolata idioma kaj komunikilo de la klerigitaj klasoj en Eŭropo. Sed hodiaŭ tiu procezo draste akceliĝas. Ĝi okazas pro diversaj kialoj: milito, migrado, ekstermado de triboj kaj komunumoj, malagnosko kaj malpermeso de lokaj lingvoj, tutmondiĝo ktp. Nova faktoro estas la aktiveco de premgrupoj, kiel la tiel nomata *Project for the New American Century* (Projekto por la nova usona jarcento), kiu celas fortigi la influon kaj potencon de Usono en la tuta mondo kaj trudi la usonanglan kiel ununuran mondan lingvon. Eĉ grandaj prestiĝaj lingvoj estas minacataj kaj perdas sian iaman statuson, kiel vehikloj de kulturo, scienco kaj komerco. Strange, plu-

raj popoloj kaj ŝtatoj ŝajnas bonvenigi tiun eklipson de siaj lingva graveco kaj kultura influo.

Tamen, estas kelkaj indikoj, ke ekzistas lingvaj komunumoj, kiuj deziras konservi sian lingvan heredaĵon kaj intencas obstine rezisti ĝian malaperon aŭ marĝeniĝon. Oni povus prezenti plurajn ekzemplojn el ĉiuj partoj de la mondo, sed ni prenu nur unu: tiun de la indiĝenaj idiomoj de Skotlando. En la pasinteco Skotlando estis vere plurlingva. Sen enkalkuli la estingiĝintan lingvon de la praa pikta popolo, pri kiu preskaŭ nenio estas sciata, kaj la anglan, antaŭ ne tre longe almenaŭ kvin lingvoj estis parolataj en tiu malgranda teritorio, nome la gaela (kelta lingvo de irlanda deveno), la skota (konsistanta el diversaj dialektoj kaj ofte iom malĝuste nomata „skotangla”), la ŝetlanda (antaŭe nomata „norna”), la ŝelta (idiomo de la necigana nomada popolo de Britio kaj Irlando) kaj la romaa (lingvo de la veraj ciganoj). El tiuj

lingvoj la ŝelta kaj la romaa efektive malaperis en Skotlando; la urbaj dialektoj de la skota persistas en moderna formo inter malpli klerigitaj homoj, dum la uzado de la kamparaj dialektoj (t.e. la vera skota) multe ŝrumpis; samtempe denaskaj parolantoj de la gaela plu malplimultiĝas en siaj tradiciaj altejaj kaj insulaj regionoj, kvankam lastatempe intereso pri la lingvo sufiĉe vigliĝis ekster tiuj regionoj.

## Pesimisma Auld

En siaj skribaĵoj William Auld, nia renoma skota poeto de la esperanta lingvo, esprimis sin tre pesimisme pri la situacio kaj estonteco de la indiĝenaj idiomoj de Skotlando. En siaj notoj al la dua eldono de *La infana raso* (1968) li skribas: „*Gaelo*: La keltaj loĝantoj en nord-okcidenta Skotlando kaj sur la skotaj insuloj parolas la lingvon gaelan, kiu iom post iom formortas ...”, kaj en sia broŝureto *La skota lingvo hodiaŭ kaj hieraŭ* (1988) li asertas: „Mi opinias, ke la skota lingvo kiel lingvo aparta rapidege mortas ... Se Esperanto estas ‘lingvo sen popolo’, kiel iuj pretendas, do la skotoj estas ‘popolo sen lingvo’.”

Eble Auld pravas; tamen aliflanke, povas esti, ke tiu pesimismo ne estas tute pravigita. Ekde la restaŭro en 1997 de la skota parlamento oni konstatas en Skotlando renovigitan intereson pri la aparta nacieco kaj pri la indiĝenaj lingvoj de la skotoj. Pruvo de tio estas nova reflorado de aŭtenta skota literaturo kaj pliiĝo de eldona aktiveco en la lando. Kvankam hodiaŭ oni malofte aŭdas la skotajn dialektojn en „pura” tradicia formo sur la stratoj kaj eĉ en la kamparo, kaj malgraŭ la ŝrumpado de denaskaj gaelparolantoj en la lokoj, kie la gaela iam estis la ĉiutaga lingvo de la tuta loĝantaro, tiu literatura reflorado estas tre evidenta, precipe rilate al la gaela. Neniam antaŭe en la historio de Skotlando estis tiom alta la kvalito de



la artoj romana kaj novela, kaj neniam pli abunda la publikigo de libroj en tiu lingvo.

### Literaturaj revuoj

Signifoplena estas la fakto, ke du el la plej bonaj literaturaj revuoj en Skotlando estas publikigataj ne en la majoritata kaj plej prestiĝa angla, sed en la gaela kaj la skota. Temas pri la revuoj *Gath* (gaellingva), kaj *Lallans*. Gaellingvaj poetoj kaj eldonistoj ŝatas doni plursencajn titolojn (kiuj abundas en la gaela). „*Gath*” signifas „lumfasko”, „radio”, „insekta piko”, „lanco” ktp, kaj la elekto de tiu plursenca titolo estas intenca. „*Lallans*” estas la nomo de la literatura formo de la malalteja skota lingvo.

Ambaŭ revuoj publikigas prozon kaj poezion ne nur de jam konataj aŭtoroj, sed ankaŭ de novaj junaj verkistoj, kiuj hodiaŭ tute ne mankas. Kelkaj el la junaj kontribuantoj al *Gath* estas gefiloj de gepatroj el malsamaj landoj – ekzemple Germanio kaj Skotlando – kiuj deziras esti kulturitaj en la gaela (supozeble la prapatra lingvo de unu el la gepatroj). Aliaj regulaj kontribuantoj estas irlandanoj, kiuj verkas kaj en la irlandgaela kaj en la skotgaela. Unu el la kontribuantoj, kiu devenas de Nord-Irlando, komencis verki en la skotgaela, prefere al la irlandgaela, ĉar dum la periodo de malpaco en tiu teritorio (kiu feliĉe jam ĉesis) uzantoj de la irlanda lingvo estis suspektataj de porbritaj uniistoj.

La redaktoroj de *Lallans* uzas pli-malpli normigitan kaj iom artefaritan skotan, sed multaj kontribuantoj verkas en siaj lokaj dialektoj, inkluzive de la tre diverĝa ŝetlanda. La rezulto de tia libereco estas tio, ke kelkfoje legantoj bezonas iom da mensostreĉo aŭ sperton pri diversaj dialektoj, por bone kompreni la tekstojn. Precipe la kvalito de la poeziaj kontribuadoj en la skota estas alta.

*Gath* estas sekvanto aŭ „posteulo” de alia tre sukcesa gaela literatura revuo, nome *Gairm* (Alvoko), kiu daŭris 50 jarojn, ĉiam kun la sama redaktoro, ĝis lia ekŝiĝo de la redaktoreco en la aĝo de preskaŭ 80 jaroj. Kiam tiu revuo ĉesis, oni timis, ke la gaela literatura

aktiveco en Skotlando suferos gravan frapon pro ĝia malapero, sed *Gath* estas digna kaj komparebla publikigaĵo, kiu havas la plian avantaĝon, ke ĝi allogas pli kaj pli da junaj verkistoj kaj poetoj.

Malkiel la publika sinteno rilate al la gaela lingvo, kiu lastatempe iĝis pli pozitiva, tro da skotoj rigardas la parolatan skotan kiel idiomon de malpli klerigitaj homoj. Tamen, ofte personoj, kiuj neniam aperte parolas ĝin, pretas verki en ĝi. Kredeble, la nura fakto, ke ili kapablas verki en la skota (aŭ en iu ajn lingvo), elmontras, ke ili ne estas neklerigitaj!

### Antaŭjuĝoj

Supozeble similaj sintenoj kaj antaŭjuĝoj troviĝas en aliaj partoj de la mondo, kie ekzistas lokaj lingvoj kaj dialektoj, rigardataj kiel idiomoj de

malsupera statuso, parolataj de nuraj kamparanoj aŭ sensciuloj. La aŭtoro de ĉi tiu eseeto pasigis sian fruan infanecon en Galegio (nord-okcidenta Hispanio), kie, inter la klerigitaj klasoj, la regiona idiomo estis malpli estimata ol la ŝtata kastilia hispana lingvo, kvankam, iom paradokse, ĉiuj ŝajnis estimi siajn galeglingvajn poetojn, kiel la tre amata Rosalía de Castro, „poetino de la senpatrujuloj”, kiu priskribis sin kiel „fremdulino en sia patrujo”.

Tro malfrue la plej perceptaj inter ni komencas rekoni, ke ĉiu lingvo kaj ĉiu kulturo konsistigas valoran parton de la komuna heredaĵo de la homaro, kiu meritas esti estimata kaj konservata. Kelta diraĵo trafe asertas: „*Tír gun chánan, tír gun anam*” (Lando sen lingvo estas lando sen animo).

Garbhan MacAoidh

*Dulingva afiŝo, en la gaela kaj en la angla, en la insulo Skye, Skotlando.*



BULGARIO

# Festo de ĝemeloj

Interesa kaj ĝis nun unika tradicio estiĝis en la bulgara ripozejo *Zlatni pjasaci* (Oraj sabloj) ĉe la Nigra Maro. Ekde 1991 tie ĉiujare en septembro okazas landa renkontiĝo de ĝemeloj.

La pasintjara renkontiĝo estis jubilea. Ĝin partoprenis 300 ĝemeloj. La plej junaj partoprenantoj estis paro de la sesmonataj beboj Ivan kaj Georgi el Varno, venigitaj de sia patro Ivajlo. La plej maljuna paro estis 83-jaraj Zlatka kaj Vasilka Trifonov el Sofio. Partoprenis ankaŭ 2 triĝemelinaj – la 17-jaraj belulinoj el urbo Ruse kun nomoj de la filinoj de Sankta Sofia – Vera (Kredo), Nadejda (Espero) kaj Ljubov (Amo) kaj Iva, Nedelina kaj Diljana el la urbo Tvardica. La dujaraj knabinoj Viktoria kaj Joana, vestitaj en egalaj koketaj roboj, estis venigitaj de siaj du avinoj – la 63-jaraj ĝemelinaj Slavka kaj Stefka Krumovski el Varno.

Du paroj – la 21-jaraj studentoj Milen kaj Veselin kaj ĝemelinaj Mimi Marinova kaj Pepi Patronova, naskitaj la 2an de septembro 1963, festis sian naskiĝtagon. Mimi Marinova siaflanke estas patrino de geĝemeloj Ĵanet



kaj Pavel, kiuj venis en la vivon la 2an de oktobro 1999. Ĉiuj ĝemeloj, kiuj festis sian naskiĝtagon, ricevis donacon de la gastigantoj de la festo – torton kaj botelon da ruĝa vino de la marko *Zlatni pjasaci*.

Ĉiuj paroj kaj tripoj surhavis samajn vestojn. Kaj tio ege bone efikis.

Tial la ĉiutaga ĵurnalo *Standart*, detale raportante pri la evento, informas pri paniko, obsedinta eksterlandajn turistojn. Germanoj kaj angloj miris ĉu ili ne trafis filmadon. Apude ja promenis egale vestitaj paroj kun samaj vizaĝoj kaj figuroj. Fakte la eksterlandanoj hazarde trafis la kulminon de la amuzfesto de ĝemeloj de Bulgario.

La programo de la festo estis tre varia. La feliĉaj paroj kaj tripoj dancis la tradician bulgaran rondodancon. Dum la 15-jara ekzisto de tiu iniciato pli ol 10 mil ĝemeloj renkontiĝis. Kvin paroj, kiuj partoprenis ĉiujn ĝisnunajn renkontiĝojn, ricevis inviton de la ripozejo. Ili estos gastoj de la ripozejo *Zlatni pjasaci* okaze de ties duonjarcenta jubileo, festota ĉi-jare.

Dimitar HAĜIEV




НИКОЛА ГИВЕР










Titolpaĝo kaj portreto de Muiris Ó Súilleabháin.



La titolpaĝo de Peig.

### ► Konservataj tradicioj

Ne multaj el la loĝantoj kutimis legi librojn. Iliaj distraĵoj konsistis el kanto, dancado, rakontado kaj konversacio. Iliaj tradicioj estis mense konservataj kaj buŝe rakontataj, kaj inkludis antikvajn legendojn – el kiuj kelkaj estis pli antikvaj ol la anglosaksa *Beowulf* – kaj poemojn kaj kantojn, kiuj datiĝis de la dek-sepa kaj dek-oka jarcentoj. Nur fragmentoj de tiu abunda tradicia trezoro estas hodiaŭ kolektitaj kaj registritaj. La plimulto estas por ĉiam perdita. En la lastaj jaroj de ekzisto de la komunumo la insulanoj ekfaris lerte konstruitajn violonojn.

Ĉiuj el la insulanoj estis gaelparolantoj, kaj, kvankam la angla lingvo estis instruata en la malgranda lernejo, nur la gaela estis parolata inter la loĝantoj. Kelkaj el la insulanoj posedis bovinojn kaj ŝafojn. La ĉefa okupo estis kaptado de omaroj dumsomere kaj de skombroj dumvintre, vere danĝera kaj necerta porvivaĵo.

La plej granda iama nombro da loĝantoj (176) estis atingita en

1916, sed post tiu jaro ĝi konstante malkreskis pro elmigrado, precipe al Usono. Kiam An Blascaod Mór estis evakuita pro malriĉeco kaj manko de preskaŭ ĉiuj rimedoj, la loĝantaro ne nombris pli ol 150 personojn.

Malgraŭ la ekstrema malriĉeco kaj klimata malmildeco konstante suferataj de la loĝantaro, Blascaodaĵo estis hejmo de eksterordinara kaj tute unika kulturo. La insulanoj parolis belegan irlandgaelan lingvon, kiu ankoraŭ montris mezepokan influon kaj posedis riĉegan vort-trezoron, kies elementoj ornamis ilian konversacion kiel lingvaj juveloj, kontraste kun hodiaŭa malriĉigita irlanda lingvaĵo, ĉu angla, ĉu gaela. Iliaj tradicioj, legendoj, poemoj, kantoj, rakontoj kaj folkloro estis abundaj kaj riĉaj.

Tiu izolita, malgranda kaj malriĉa komunumo estigis unu el la plej rimarkindaj kaj vere senegalaj skoloj de verkistoj en la mondo. Iliaj simplaj sed elokventaj kontribuadoj al la monda literaturo estas ĝenerale fervore laŭdataj de tiuj, kiuj konas ilin. Kelkaj el iliaj verkoj eĉ estas uzataj en irlandaj

lernejoj por instrui la junulojn pri imitinda gaela lingvaĵo kaj pri estinta okcident-irlanda vivmaniero.

La kreado de tia literatura trezoro komenciĝis per la eldono de la membiografiaj memoraĵoj de iu insulanino, nome Peig (aŭ Peg) Sayers (1873-1958). Peig scipovis legi kaj skribi, sed nur en la angla (por ŝi fremda lingvo), ĉar lerneja instruado, kiun ŝi ricevis sur la ĉeftero, ne okazis tiam en la gaela lingvo. Do ŝi diktis sian nun faman libron en ŝia bela gepatra idiomo.

En tiu tempo (precipe inter 1910 kaj 1930) diversaj erudiciuloj kaj esplorantoj de la gaela lingvo kaj insula kulturo vizitadis la insularon. Unu el la plej konataj el tiuj vizitantoj estis Robin Flower [flaŭer], gaele kromnomita Bláithin'. Li kaj kelkaj aliaj instigis la insulanojn skribi siajn memoraĵojn pri tiu malaperonta insula vivo kaj pri ĝiaj tradicioj. La unua, vivo propramane verkis, estis Tomás Ó Criomhthainn [o krohajn] (1854-1937). Li estis aŭtoro de libroj kies titoloj estas *La insulano kaj Tradicioj el la okcidenta insulo*. Je la fino de la unue nomita verko, lia membiografio, Ó Criomhthainn skribis ĉi tiun kortuŝan kaj ofte citatan frazon: „Detale mi skribis pri multe el tio, kion ni faris, ĉar estis mia deziro, ke ie res-tu memoraĵo de la tutaĵo, kaj mi stre-



Tomás Ó Criomhthainn (Crohan) kun sia libro.

bis priskribi la karakteron de la homoj ĉirkaŭ mi, por ke post ni daŭru iu kroniko pri ni, ĉar neniam plu estos popolo simila al ni.”

La tiam plej juna el tiuj insulaj verkistoj estis Muiris Ó Suilleabháin [mŭiris o sulavójn] (1904-1950), aŭtoro de *Dudek jarojn kreskante kaj Dudek jarojn florante*. Ó Suilleabháin verkis en eleganta indiĝena gaela. Bedaŭrinde, li dronis relative juna dum naĝado. Ankaŭ la fratino de Muiris, Eibhlín Ní Shúilleabháin, verkis libron kun la titolo *Tagfíno*, sed laŭŝajne ĝi neniam estis publikigita.

La lasta el tiu unika grupo da poetoj kaj rakontistoj de la Blasket-insularo estis Micheál Ó Gaoithín [miĥól o gejhín], filo de Peig Sayers, kiu verkis la libron *Domaĝe, ke la juneco ne daŭras*.

### Apenaŭ edukitaj

Tiuj libroj estis poste angligitaj por pli vasta publiko, kaj pluraj estis tradukitaj en diversajn aliajn lingvojn. Entute, oni kalkulas, ke almenaŭ 15 libroj estis verkitaj de la insulanoj. Estas preskaŭ neimageble, ke en iu ajn alia parto de la mondo, tiom da literaturo estus kreata de tiom eta socio de



Peig kontemplante apud sia fajrejo.

simplaj, apenaŭ edukitaj homoj. Estu rimarkita, ke la loĝantaro ne superis entute 150 homojn!

Malkiel kelkaj disvastigitaj eraraj ideoj pri la kelta karaktero, la Blasket-insulanoj (kaj aliaj anoj de la kelta familio) ne estis mistikaj romantikuloj loĝantaj en magiaj krepuskaj regionoj. Ili neniel estis ventkapuloj, sed praktikaj kaj solidaj boatistoj kaj kamparanoj, kiuj devis batali por apenaŭ vivi sur sia venta, senŝirma, senarba, senkomforta kaj senrimeda – sed severe bela – insuleto, ĉe la tutlasta marĝeno de Eŭropo.

Starante sur la okcidenta rando de la duoninsulo Dingle [dingl] (gale: Daingean), kaj rigardante la vastan Atlantikon, iu ajn vizitanto povas admiri la imponan panoramon de la soleca Blasket-insularo. Tamen, se oni havas okazon surteriĝi sur Blascaod Mór ekster la turisma sezono, oni ne plu aŭdos homan voĉon – nur la melankolian kriegon de la marbirdoj, kaj la sonon de la marondoj frakasiĝantaj sur la rokojn. La voĉoj de la insulanoj restos por eterne silentaj. Eĉ iliaj skribaĵoj – krom kelkaj malmultaj – ne plu estas facile troveblaj en la librovendejoj aŭ bibliotekoj.

Tomás Ó Criomhthainn pravis: „Neniam plu estos popolo simila al ni.”

Garbhan MACAOIDH

DICK NEMPSEY





IRLANDO

# Ornamentaj manuskriptoj

Detalo el la unua paĝo de la evangelio laŭ sankta Johano.



BOOK OF DURROW, 110-120  
Egerton-Paper



Title Page of Birr Manuscript Copy of Adamnan's Law

„Lando de sanktuloj kaj doktuloj” – tiel Irlando estis konata, dum Eŭropo dormetis tra la mezepoka mallumo. Monaĥoj el la insulo elmigris al tuta Eŭropo, fondante monaĥejojn kaj kunprenante la kristanan mesaĝon. Tiutempe ne ekzistis presitaj libroj kaj granda parto de la laboro de la monaĥoj estis kopiado de parto de la Biblio (precipe la evangelioj). La kopioj estis farataj sur veleno laŭ hodiaŭ ne plu uzata irlanda skribsistemo. Kutime la kopio komenciĝis per tuta senteksta paĝo de desegnoj, la tiel nomata „tapiŝa paĝo”. La dua paĝo nomiĝis „incipito”, el latina vorto signifanta „ekkomenco”. Tie la unuaj vortoj de la evangelio aperis, kun bele ornamentaj majuskloj kaj kelta interplektaĵo, ofte kun homaj kaj bestaj elementoj.

La plej konata libro estas la Libro de Kells. Ĝi originas de la insulo Iona, hebrida insulo de Skotlando okcidenta, kie sankta Kolumba (Columcille) fondis monaĥejon. Kiam la vikingoj

Detaloj el la Libro de Durrow („tapiŝa paĝo”), la Evangelioj de MacRegol (la unua paĝo de la evangelio laŭ sankta Johano), la Libro de Kells (la „incipito”), la evangelio laŭ sankta Marko (titolpaĝo de la Birr-manuskripto, nome la titolpaĝo de la leĝo de Adamnan por protekto de senkulpujoj).



atakis la insulon, la monaĥoj eskapis, prenante la libron kun si al alia monaĥejo de sankta Kolumba en Kells (irlandgale: Ceannanas Mór [kʲananas moor]), en Irlando. Alia, pli antikva, estas la Libro de Durrow [daru] (gale: Dearthmogh [dʲarʲma]) apud Tullamore en meza Irlando. Tie Columcille fondis monaĥejon antaŭ ol iri al Iona, l' Caluimcille [i kalmkilje].

### La Evangelioj de MacRegol

En septembro 2006 okazis konferenco en Birr, meza Irlando, pri la Libro de Birr, ankaŭ nomata la Evangelioj de MacRegol (angle: *the MacRegol Gospels*). MacRegol estis abato de la monaĥejo de Birr, kiu mortis en 822, do la libro estis kopiita antaŭ tio. Sankta Brendan „la navigisto” fondis tiun monaĥejon, sed de ĝi ne restis eĉ ruinoj. La libro estas la sola relikvo de ĝi kaj estis „perdita” dum 700 jaroj kaj trovita en Anglio en 1681, kiam iu John Rushworth [raŝuëf] donacis ĝin al la biblioteko *Bodleian* de Oksfordo. Tie ĝi restis ĝis hodiaŭ, sed nun, pro la granda strebo de kelkaj homoj en Birr, la publiko povas rigardi kaj foliumi belegan faksimilaĵon, kiu ekde nun estos gardata en la publika biblioteko de Birr.

Dum la semajnfino estis rakontata la mirinda historio de tiu kopio. La koncernaj spertuloj kaj la organiza komitato prelegis pri la kompleta fotografado de la libro en Oksfordo, la kopiado sur 59 kompaktaj diskoj, la sendado per aparta kuriero al Birr, la presado de *Brosna Press*, Ferbane, kaj la bindado de Tony Cains, Trinity College, Dublin. La libro estis tiom granda, ke devis esti binditaj (en belega ruĝa kaprohaŭto) du volumoj. Tiuj spertuloj (fotografisto James Allan de *Bodleian*, direktoro de *Brosna Press* Diarmuid Guinan, bindisto Tony Cains el Dublino) renkontiĝis por la unua fojo en tiu semajnfino. Kelkaj aliaj spertuloj pri kelta arto kaj skribsistemo prelegis pri la beleco kaj signifo de la artelementoj.

### La psalmaro de Fadden More

Nur unu monaton antaŭ la konferenco okazis la mirakla trovo de alia manuskripto, dum viro fosis en torfejo.



Konferenco pri la manuskripto de MacRegol.

Io simila al bulo de lasanjoj (kiel diris Pat Wallace [ŭalis], direktoro de la Muzeo de Irlando) venis al la surfaco de la grundo. Feliĉe, Edward Fogarty, la trovinto, sciis, ke ĝi devas esti tuj rekovrita per malseka torfo, por ke ĝi ne diserigu. Li re-entrigis la trovaĵon kaj informis la muzeon. Kelkaj jaroj de konsultado kaj traktado devos okazi, antaŭ ol ĝi povos esti montrata en la muzeo. Ĝis nun oni konstatis, ke ĝi estas kopio de psalmo 82 kaj ke ĝi enhavas desegnaĵon, sed ne estas certe, ke ĝi povos esti savita kaj konservita. Espereble okazos alia konferenco en Birr post kelkaj jaroj por rakonti la historion de la psalmaro de Fadden More.

Garbhan MACAOIDH



Mapo de la vojaĝoj de irlandaj monaĥoj en Eŭropo.

FINNLANDO

# Kultivi bonsajon

Oni delonge provas kultivi ne nur en Japanio miniaturajn arbojn en ĝardenoj aŭ potoj. Tial en la moderna mondo ŝajne sole la nomo „bonsajo” asocia la hobion kun ĝia devenlando.

Por enĉambra bonsajo oni elektas malprofundan ujon el ceramiko aŭ plasto. En la nordaj klimatkondiĉoj oni povas kreskigi bonsajon ekzemple el pomarba semo, el pinido, kreskanta en arida loko, el sorp-arbido, el betule-

to. Multaj bonsaj-ŝatantoj aĉetas sian unuan bonsajon en vendejo aŭ ricevas ĝin kiel donacon. Tiukaze en la poto kutime kreskas planto pli ekzotika ol en la naturkondiĉoj de la koncerna lando.

Estus bone ekde la komenco enskribi ĉion pri sia bonsajo en kajeron, kiu poste estus ties „taglibro”. En ĝi legeblus pri sukcesoj, danĝeroj kaj problemoj, pri la tuta evoluo de la planto kaj ties kultivanto. El tiu kajero aliaj bonsaj-ŝatantoj plezure ĉerpas konsilojn, kaj se oni donacus la bonsajon al amiko, li povus ekkoni la planton ekde ĝia apero.

Ne ĝustas la aserto, ke kultivi bonsajon signifas torturi la planton. Kvankam oni devas zorgeme tondi branĉojn, radikojn kaj ligi junajn branĉojn, por ke ili kresku en ĝusta direkto, la tondado neniam estas drasta kaj la ligojn oni neniam igas vundi aŭ sufoki la planton. Male, oni dorlotas la bonsajon per ĉiutaga ŝprucado, taŭga sterko, kontrolo de la temperaturo kaj lumo en la ĉambro. Multaj bonsaj-ŝatantoj ankaŭ „parolas” aŭ „kantetas” al sia planto-amiko. Foliarbajn bonsajojn oni aŭtune transigas en malvarmetan lokon, la plej nordajn speciojn oni devas vintre meti en kelon aŭ ŝirmi en kesto sur balkono dum la frostaj monatoj.

Bonsajo en bela poto, por kiu oni zorgeme elektis konvenajn ŝtonetojn, muskon kaj herbetojn, kreskontajn sur la surfaco, povas fariĝi tre kara miniatura ĝardeneto. En ties ĉeesto la posedanto-kultivanto malstreĉiĝas, meditas kaj refreŝiĝas post labortagoj aŭ dum personaj problemoj. Bonsajon oni povus kompari kun dorlotbesto. Tamen ĝin oni ne bezonas promenigi, kaj ĝi povas vivi multe pli longe. Kultivi bonsajon ĉiam estas silenta aventuro.

Saliko





# Kiso sur la ventro

**P**ovas esti, ke al pruduloj ne plaĉas miaj skribaĵoj, tamen mi priskribas interesajn aferojn, kiuj parte okazas al mi, parte estas fantazio. Mi skribas tiel, ke la presejan farbon ili povos toleri.

Estas interese, ke la virina vestomodo tiom multgrade celas la seksan ekscitigon de viroj. Dum mia longa vivo mi jam vidis plurajn virinajn vestomodojn. Kiam mi estis junulo, estis granda travivaĵo, se oni povis ekvidi la genuojn de virinoj, ne parolante pri tio, ĉu la vento iom levis la jupon kaj videbligis parton de la femuroj. Poste sekvis la minijupo, kiu montris la plenan femuron. Tio fariĝis iom rapide kutima. Tial venis la longa jupo, sed flanke ĝi estis fendita preskaŭ ĝis la talio. Tiu jam estis iom pli ekscita, ĉar oni atendis la malfermon. La varmega kalsoneto ne havis longan vivon, ĉar ĝi montris la tutan malsupran parton, kaj oni ne devis atenti, kiam sub la minijupo estis videbla la kalsoneto. Fine venis la tre ekscita travidebla robo, pri kio detale mi jam skribis en mia novelo *Reciproka rekompenco*.

La projektantoj de la modo opiniis, ke sub la talio jam ne troviĝas novaj montreblaj partoj de la korpo. Tial ili serĉis lokon iom super la interfemuraĵo. Nun la virinoj dorlotas la virajn okulojn per la montrado de la umbiliko kaj de la pli malsupra parto de la ventro.

Nu, legu. Ĉe metro-haltejo mi atendis la veturilon. Tie staris multaj homoj, inter ili ankaŭ junaj virinoj. La umbiliko de preskaŭ ĉiu estis videbla. Oni diras, ke nuntempe nur tiaspecaj pantalonejoj kaj jupoj estas aĉeteblaj. La prudaj fermas ĝin per iom longa bluzo aŭ trikotaĵo.

Proksime al mi staris du ĉarmaj, tre belaj, ridetantaj junulinoj. Unu el ili havis blondan hararon, la alia brunan. Ili estis tre junaj, laŭ mia takso sub la

dudeka. Ili estis elegante vestitaj, kaj certe ne en stratanguloj ili vendadis siajn ĉarmojn. Tamen la zono de la pantalono estis preskaŭ en la alto de la supra parto de la subhararo. Super ĝi belforma ventro globiĝis, helbruna, velureca. En la umbiliko de la blonda estis fiksita bela, sufiĉe granda broĉo.

Mi ne povas bridi mian langon kaj mallaŭte rimarkigis:

„Tre belan ventron vi havas.”

Ne okazis skandalo, ili gaje ekridis al mi.

„Nu, ĉar vi estas tiom karaj, mi rakontos ion al vi”, mi diris. „Antaŭ ne longe mi veturis per tramo, sidante sur benko. En la kupeo estis multaj. Antaŭ mi staris bela junulino, tiom proksime, ke inter mia nazo kaj ŝia nuda, bela, globforma, bonodora, alloga ventro la distanco estis nur kelkaj centimetroj. Apenaŭ mi povis bridi la grandan inklignon, kiun mi havis, por kisi tiun belaĵon. Mi imagis, kiom agrable estus buŝe tuŝi ĝin. Mi tamen ne volis skandalon, tial mi kisis ĝin nur en penso.”

La blondulino ridetante, kare, petole flustris al mi:

„Kun ĝojo, mi volonte permesus al vi kisi mian ventron.”

Iom surprizite mi respondis, ke en tiu granda amaso mi ne kuraĝas fari tion (ja en la amaso estus granda indigniĝo, eble nur pro envio), kaj aldonis:

„Sed diru al mi, jam de longe mi pensadas, vidante tiaĵon, kiamaniere tiu bela, granda, orkolora broĉo estis fiksita en via umbiliko.”

„Per pinglo”, ŝi respondis.

Tuj ŝi montris al mi la pinglon, kiu super la umbiliko estis trapikita en la haŭto de la ventro. Sur la supra, ekstera fino de la pinglo estis blanka perlo. La truon de la umbiliko ĝi trapontis, paralele al la eksteraĵo de la ventro. Tiu certe ne ordinara pinglo tenis la broĉon per hoketo. Tiu peza broĉo certe tiras la pinglon, kiu tenas ĝin.

„Ĉu tio ne dolorigas vin?” mi demandis.

„Ne, tute ne”, ŝi respondis.

En la metroo ni babiladis pri ĉio. La du knabinoj iom flustradis, poste la blonda diris al mi, ke mi tre plaĉas al ŝia amikino.

„Ankaŭ vi estas karaj, simpatiaj kaj ambaŭ plaĉas al mi. Se almenaŭ je kvindek jaroj mi estus pli juna, certe ni povus kaŭzi agrablaĵojn unu al la alia.”

Sed la metroo atingis la duan haltejon, kie mi devis eliri. Mi tre volonte restus plu kun tiuj karaj ĉarmulinoj, sed mi havis neprokrasteban aferon. Tial per varmega manpremo ni adiaŭis.

Tamen kelkajn tagojn, eĉ fojfoje poste mi feliĉe rememoris tiujn knabinojn kiel en lastaj lumradioj antaŭ sunsubiro.

János SÁRKÓZI



# Modernantikvaj fabeloj



Ĉi tiu modestaspekta libro konsistas el rerakonto de sep budhismaj fabeloj, bazitaj sur, sed ne kopiitaj el *Dhammapada* kaj *Jaataka*. En ĉiu el ili, bodisatvo (es-tonta Budho) partoprenas, kelkfoje kiel la protagonisto, kelkfoje kiel la kom-patema reĝustiganto. Transforminte sin en beston, li helpas protekti aliajn bestojn kontraŭ morto fare de homoj; transforminte sin en homon, li helpas endanĝerigitan homon; transforminte sin en homon, li konigas kaj instruas la Veron al erarinta homo kaj tiel ebligas ties eventualan bodisatviĝon.

Eksplico por tiu, kiu ne konas la terminojn: bodisatvo estas persono, kiu efektive atingakiris la kvalitojn de budho, sed decidis ne budhiĝi (= eniri nirvanon) dum plu restos homoj helpendaj aŭ helpindaj. Budho estas per-

sono, kiu jam eniris nirvanon, do ne plu estas en la kosmo de ekzisto, sed en la eksterekzista stato nirvana. Nirvano estas stato nepriskribebla, tute ekster la homa komprenkapablo kaj ekster la dualisma koncepto „ekzisto/ malekzisto” kaj „vivo/morto”. Kvankam en la homa historio ni scias pri nur unu budho kaj lin do nomas *la Budho*, la mondo konis ankaŭ aliajn personojn, kiuj budhiĝis; kaj la nombro de bodisatvoj estas nekalkulebla. Tiu konceptaro estas la fundamento de la fabeloj budhismaj, do ankaŭ de la sep fabeloj en ĉi tiu libro.

En la budhisma doktrino ekzistas ankaŭ dioj; ili estas uloj, kiuj per sia multmeritiĝo post sia morto renaskiĝis en iu el la ĉieloj. La ĉieloj kaj la dioj estas parto de la ekzistanta kosmo, kaj inter ili vivas la bodisatvoj. Kiam en nia nuna fabelaro estas parolate pri *la Budho*, efektive temas pri la historia persono, kiu, antaŭ ol eniri nirvanon, pro sia meritego vivis, kiel bodisatvo, en iu el la ĉieloj kaj fojfoje revenas al la tero por helpi estulojn bezonhavaĵajn.

Ĉiu vivanto, ĉu homo, ĉu besto, naskiĝas kaj poste mortas, kaj post la morto renaskiĝas; ne nepre kiel sam-speca estulo: homo povas renaskiĝi kiel besto, se li perdis iom el sia nobla karaktero; besto povas renaskiĝi kiel homo, se ĝi akiris pli da nobleco. Do nin ne mirigu, ke en la fabeloj homoj kaj bestoj traktiĝas egalrange.

La unua fabelo en la libro, *La regrifuzanto*, rakontas pri princo, kiu decidas nenial fariĝi reĝo, ĉar reĝo faras fiaĵojn. Plenumi tiun decidon estas por li malfacilege. Sed fine li sukcesas instigi eksreĝiĝi kaj anstataŭe fariĝi monaĥo ne nur sian patron, sed ankaŭ kelkajn aliajn reĝojn.

La lasta fabelo en la libro havas tre malsimilan temon. Studento, kiu rajtas akiri sian diplomon, estas kalumnianta. Lia instruisto tial postulas, ke, kiel

puno, li mortigu mil personojn kaj alportu la dekstran etfingron de ĉiu el ili. La studento do fariĝas mortigisto, kiun timas kaj evitas ĉiuj personoj. Por akiri sian milan dekstran etfingron, li estas murdonta sian propran patronon. Sed lastamomente la Budho lin renkontas kaj instigas meditati. Per sia meditado li ekkonscias pri la vero kaj rezignas sian fiecon. Li monaĥiĝas. La aliaj homoj lin batadas, sangigas, preskaŭ mortigas.

Li renkontas la Budhon, kiu diras al li: „Multajn fiaĵojn vi faris, do neniel mirindas, ke ĉi tio okazis. Ĝoju, ke post viaj fiaĵoj vi vivis tiel meritege. Aliokaze okazus multe pli, ne nur dum ĉi tiu vivo, sed ankaŭ dum venontaj vivoj, dum centoj kaj miloj da jaroj. Agoj naskas sekvojn.”

Mi rekomendas legi ĉi tiujn fabelojn. Ili edifas dumdistre, tre efike.

Kelkaj vortoj pri la eldonmetodo: oni nun povas mem, senkoste, eldoni siajn verkojn, pere de [www.lulu.com](http://www.lulu.com). Oni sendas prespretan elektronikan kompostaĵon de sia verko. *Lulu* presigas ekzempleron de verko, nur kiam venas mendo. Ricevinte pagitan mendon, la entrepreno ricevas procenton de la vendoprezio; kaj post depreno de la preskostoj la aŭtoro ricevas la reston de la vendoprezio. La procedo ebligas senriske eldoni siajn verkojn.

Gunnar Gällmo disponigas per [www.lulu.com](http://www.lulu.com) plurajn siajn esperantolingvajn verkojn. La prezoj estas tre moderaj, kaj vi povas legi detalojn pri la libroj ĉe *Lulu*.

Donald BROADRIBB

Gunnar Gällmo: „*La regrifuzanto*” kaj aliaj budhismaj fabeloj. Eld. la aŭtoro per *Lulu*. 84 paĝoj gluitaj. Mendebila ĉe [www.lulu.com](http://www.lulu.com) kontraŭ 6,21 USD + 4,25 USD afanko.

# La mondo laŭ la vidpunkto de leopardo

**Ĉ**i tiu tre bonaspekta libro estas riĉe ilustrita, per naivstilaj desegnaĵoj, faritaj de la aŭtoro. La libro precipe celas infanojn, miakonjunkte ĉirkaŭ 13-jarajn. Havante la formon de romano, la verko ankaŭ celas instrui. Verkis ĝin specialisto pri kampara bestkuracado. La loko de la romano estas Sud-Afriko. La bestaro, menciita en la rakonto, estas sud-afrika, do valoras havi ĉemane vortaron por konatiĝi kun ili, ĉar plejparte iliaj nomoj ne estas konataj al eksterafrikano. La romano estas facile legata, kun klara stilo, kaj la traduko estas senpeka. Ankaŭ la kompostokontrolo estas tre zorge farita; se enestas preseraroj, mi ne trovis ilin.

Per la vivospertoj de nove naskita, kaj frue orfigita, sovaĝa leopardo Ĵimon ni lernas ne nur pri la pejzaĝo sud-afrika kaj la sentoj kaj bezonoj de rabobesto, sed ankaŭ pri multaj danĝeroj, kiujn alfrontas tia besto. Inter tiuj danĝeroj estas ne nur la minaco de aliaj rabobestoj, sed ankaŭ la problemo eviti homojn. Leopardoj estas protektata specio, sed bienuloj emas forgesi la leĝojn, rilatantajn al tiu fakto.


Disŝutitaj tra la romano estas ne-longaj skizoj pri apartaj familioj homaj, kiuj penas vivteni sin per paŝtado de „dombestoj” (ŝafoj, kaproj, bovoj k.c.), kiujn amas ataki kaj vori ne nur la leopardoj, sed ankaŭ diversaj aliaj rabobestoj sovaĝaj. Ankaŭ la ĉie uzata homprotektanto, la hundo, estas bongusta frandaĵo por sovaĝa besto.

Ni trovas, ke la deziro protekti „endanĝerigitajn” sovaĝajn speciojn estas laŭdinda, sed ne ĉiam bone planita. En la lasta parto de la romano la aŭtoro konigas al ni la danĝerojn, kiujn povas prezenti al rabobesto la vivo en boncela kaptiteco. La manko de taŭga manĝaĵo: la digestosistemo

de sovaĝa leopardo evoluis, spertante iom putrajn bestokadavrojn, kaj ne ĉiu parto de morta besto estas egale nutra por sovaĝa leopardo. La provizado de nur freŝa viando efektive malsanigas Ĵimon, kiu resaniĝas nur post eskapo el la „protektata regiono”, kiun prizorgas boncelaj homoj. Ankaŭ la manko de senlima libero vagadi kaj trovi naturajn kaŝlokojn por tranoktado aŭ por naski kaj varti idojn povas endanĝerigi kaj la korpan kaj la psikologian sanon de la rabobesto.

Aliflanke, la bezonoj de la homoj, klopodantaj vivteni sin, bredante bestojn kaj kreskigante necesajn vegetaĵojn por la homa nutrado, konflikta kun la vivbezonoj de la sovaĝaj bestoj. Ĉu ekzistas eblo solvi tiun dilemon? La aŭtoro, per sia tre hom- kaj best-ama detaligo de la vivo en tiaj regionoj, tre klare montras al ni la naturon de tiu dilemo. Ĉiu vivanto renkontas gravajn, kaj ne ĉiam supereblajn, problemojn. Ni ne tro idealisme imagu, ke la paca kunekzisto estas fundamenta parto de la naturo. La naturo estas tiom pereiga, kiom vivefika.

Kvankam valora kaj ĝudona romano por infanoj, ankaŭ por plenkreskaj



homoj la verko taŭgas. Ne atendu kutiman aventurromanon, plenan de eks-citaj, sed malfacile kredeblaj eventoj. Sed ja atendu tre versimilan priskribon de la reala vivo, kiel ĝin spertas realaj vivantoj. Kaj pretu etendi la varmon de via koro kaj al sovaĝa besto, penanta vivteni sin en danĝeroplana medio, kaj al la homoj, kiuj simile penas vivteni sin en egale danĝeroplana medio.

Verko rekomendinda por serioza leganto, ĉu infana, ĉu aĝe postinfana.

Donald BROADRIBB

Siegfried Stampa: Ĵim' la migrulo. Tradukis Rüdiger Sachs. Eld. Kava-Pech, 2007. 175 paĝoj kudritaj. ISBN: 978-80-85853-92-6.

Prezo ĉe FEL: 15 eŭroj + afranko.

**La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO  
estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,**




Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen, Belgio.  
Tlf. + 32 3 234 34 00; tlk. + 32 3 233 54 33;

rete: [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net);  
skajpe fel-monato  
aŭ per [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

# Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



**La paŝo senelirejen:** La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



**Dialogo inter surduloj:** Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

**Prezo: po 6 eŭroj + afranko.**

**Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.**





### Solvo de la novembra enigmo: 3 en 1

La jenan solvon de nia novembra enigmo inter multaj aliaj trovis Sonia Amariglio, Didier Izacard kaj Don Rogers. Ili ĉiuj jam ricevis sian libropremion!

- 1 adjektivo + sama adjektivo + taŭga R = senceremonian vestaĵon
- 2 postuli R + gutoj de vaporo R + angla biero = spicaĵo
- 3 distingilo R + malvira + mola hararo R = fikcian
- 4 vasta etendaĵo de sala akvo R + mustelspecia besto R + daŭro = konfitaĵo
- 5 longa metala stango R + instigi + homo = kredanto
- 6 adverbo + granda mevo R + scii R = sepkoloran kurbblindon
- 7 adverbo + prepozicio + prefikso = irigis malproksimen
- 8 lina teksaĵo R + parte + materia kvanto R = inklinas al permesado
- 9 ujo R + kanapo R + frakcio = muzikilo
- 10 prepozicio + aspiro R + membro = blanka argilo
- 11 hejma besto + faco R + ekstrem parto de nazo = episkopa preĝejo
- 12 narkota substanco R + poseda adjektivo + korp parto R = vantano
- 13 transformi en ledono R + adverbo + pagilo R = procentan partoprenon en profito
- 14 ŝipoparto R + giganto R + korinklino = pezo
- 15 prefikso + sidi sur ovo R + gento R = revelacias
- 16 reala R + remparo R + amfibio R = rilatan al kupra oksido
- 17 interpunkcia signo R + minaĵo R + objekto = varo
- 18 prefikso + rapide moviĝi R + aervibrado R = esploran promenadon
- 19 romboforma marfiŝo R + eŭropano R + pezo de ĉia ententantaĵo R = kavalkado R
- 20 enmara roko R + preni ion kiel rimedon + prepozicio = rezignis

T	R	O	T	R	O	B	O	N
P	E	T	R	O	S	E	L	O
N	O	M	I	N	A	L	A	N
M	A	R	M	E	L	A	D	O
R	E	L	I	G	I	U	L	O
Ĉ	I	E	L	A	R	K	O	N
F	O	R	S	E	N	D	I	S
T	O	L	E	R	E	M	A	S
S	A	K	S	O	F	O	N	O
P	O	R	C	E	L	A	N	O
K	A	T	E	D	R	A	L	O
O	P	I	N	I	A	M	A	N
T	A	N	T	I	E	M	O	N
K	I	L	O	G	R	A	M	O
M	A	L	K	O	V	R	A	S
V	E	R	D	I	G	R	A	N
K	O	M	E	R	C	A	Ĵ	O
E	K	S	K	U	R	S	O	N
R	A	J	D	A	N	T	A	R
R	I	F	U	Z	I	Ĝ	I	S



Sen Rodin

# Bildoj pri Norda Lando kaj aliaj rakontoj

**NOVA!**

Juna Sudlandano vizitas landon de Nordanoj ... enamiĝas en ĝi, kaj en Nordlandano. Kiel noktopapilio li ne povas rezisti kaj tuj reiras por kaptiĝi en lanternan fajron, senbedaŭre kaj konscie.

Ĉiu ĉapitro estas aparta originala noveleto pri iu aŭ alia norda gemo. La novelaron sekvas alia novelaro de aliaj apartaj kaj tre allogaj miniaturaj.

Donald Broadribb pri ĝi komentis: „Ĉi tiu kolekto de 51 rakontoj rangas inter la plej majstraj verkoj de la aktuala esperanta literaturo.”

# ISBN: 90 77066 22 5  
# Pezo: 320 g  
# Prezo ĉe FEL: 24,00 €  
+ aŭfranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio;  
[www.retbuto.net](http://www.retbuto.net), [retbutiko@retbutiko.net](mailto:retbutiko@retbutiko.net), aŭ ĉe via kutima librejo.



## ANONCETOJ

**La kopenhagaj kluboj** KEK/DEFA kunvenantaj ĉiun lundon vespere (escepte de julio) bonvenigas vin en sia kunveno: Kulturhuset, Dorth-eavej 61, 2400 NV. Tel.+45 38 89 10 13. [chatterjeebetty@hotmail.com](mailto:chatterjeebetty@hotmail.com) / [niemann@kabelmail.dk](mailto:niemann@kabelmail.dk).

**Fantomo hantas tra l' mondo**. 16-a konferenco por (eks)komunistoj en Dobrichovice, Ĉeĥio, 2007/09/12-16. Aliĝilojn mendu ĉe Dieter Rooke, Äussere Klus 14, CH 4702 Oensingen. Rete: [IKEK2007@gmail.com](mailto:IKEK2007@gmail.com)

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de).

**"Naturista Vivo"**, la ilustrita revuo por nu-distoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adre-so: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fö u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

**Ĉu vi scias, kio estas Esperanto-sudoko?** Esperanto-sudoko estas sudoko-enigmo, en kiu oni ne serĉu 9 ciferojn, sed 9 literojn, nome la literojn el la vorto „Esperanto"! „Sudokoj", enigma libreto kun 80 diversaj enigmoj, kun ciferoj je 4 niveloj, sed ankaŭ kun literoj kaj eĉ spegulbildaj, nun aperis okaze de la 10-jara ekzisto de la Retbutiko. Ĝi signifas por vi horojn da enigmo-plezuro! Prezo: 3 eŭroj + afranko ĉe ĉiuj bonaj libroservoj kaj ĉe [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

Senkultura homo estas skliava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

**MONDKULTURA  
SENDEPENDA  
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE  
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

[gazeto@aol.com](mailto:gazeto@aol.com)

<http://www.lagazeto.com>

## La KancerKliniko

**Politika Kultura Skandalema Ajnista**  
4 numeroj jare + La Krom

**REGULAJ KUNLABORANTOJ:** Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Vilhelmo Lutermano, Ĵak Le Puil.

Abono: 22 € (ekde 14 en kelkaj landoj)  
Jacques le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe UEA, FEL, ELNA, ktp  
[ikk@free.fr](mailto:ikk@free.fr)

## Komencanto

**"Komencanto"**

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

Regule aperas ekde 1998  
Formato A4, 16 paĝoj

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)  
provizora retpaĝo:  
[www.komencanto.narod.ru](http://www.komencanto.narod.ru)

Poŝta adreso:  
KOMENCANTO,  
pk 132, Ekaterinburg,  
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj  
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.  
Abonu ĉe UEA aŭ  
ĉe via landa peranto



La plej nova novelaro de Lena Karpunina

# Neokazinta amo

kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.



## Legintoj skribas:

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

Prezo: 15 eŭroj + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: [www.retbutiko.net](http://www.retbutiko.net) - [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31